

Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503
dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana

Retpaĝo: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html> aŭ
www.esperanto.net/al

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO INSTITUTO

Nr. 112, aprilo 2014

Niaj proverboj

Kiu silenti ne kapablas, tiu eĉ paroli ne scipovas. (Sudo)
La infanon vartu, sed la maljunulon ne forlasu (Arbreŝoj)
La fadeno devas simili al la ŝtofo (Dibër)
La bonan parolvorton kie ajn vi trovas ĝin ricevu (Shkodër)
La malĝojon de la vespero postlasu por morgaŭ (Shkodër)
Karbardaŝtenilon de alies ne fariĝu (Sudo)

Adreso de redakcio: *p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana
1016 Albanio (00355682580758; bselimi@gmail.com)*

Kunlaborantoj: *Shaban Hasani 00355682080677,
shabanhasani@gmail.com; Gjergji Gusho: 0035583222326,
gjergji_gusho@yahoo.com; Agim Peraj: (00355694472430,
agimperaj@yahoo.it; Sajmir Beqiraj: (00355684030613,*

s_beqiraj@yahoo.com; *Nehat Sokoli*: 00355682587699,
sokolinehat@gmail.com; *Engjell Gusho*: 00355692350111,
engjellgusho@yahoo.fr; *Rita Permeti*: 0035542363 360;
00355686857800 ; *Luan Jaupi*: 00355682165870,
luanjaupi@hotmail.com; *Enkela Xhamaj*: 00355685135105,
xhamajkl@yahoo.com;

La enhavo

Ni kaj UEA, ILEI, AIS

Varbilo dulingva albana- esperanta
Granda esperanta novaĵpaĝo surrete
Lernolibroj por la biblioteko de Fakultato de Naturaj Sciencoj en
Tirana
Propono: Projekto de kunlaboro kun AIS
Propono al Ministrejo de Edukado kaj Sporto por enkonduki
Esperanton en bazajn lernejojn

Informaĵoj

LA NEKUTIMA RENKONTIĜO KUN NEKUTIMA HOMO
Nekutima ĝojo danke al esperantistoj
Eventoj: Rekordoj, interesaĵoj, jubileo ĉe Lingvo-Studio,
L.S, 1984-2014

El la leteroj

Interŝanĝo de opinioj kun Valentin Melnikov (Rusujo)
Letero de Birgitta Anevik (Svedio)

Nia propagando

Afiŝo de Esperanto en la albana

Nova televizio en Sidney de Australio

Google en Esperanto

El Brazilo

Lokaj lingvoj kaj

Esperanto kaj la angla kiom daŭras la lernado

Artikoloj

La genia fenomeno Ali Kuĉi

Situacio en Ukrainio

Analiza novajhletero

[Solidareco kaj homaj rajtoj](#)

Talbott: Kosovo, Rusio kaj la mememo de Putin

Beletraĵoj

Kritiko

Libroj niaj en Francio

[KAVALIRO EN TIGRA FELO](#)

Fatos Kongoli Atendante Nostradamuson

Vullnet Mato Bonata¹ akceptas la seksperforton

Intervjuo: Ankaŭ la albana beletro parolas en Esperanto

¹ Virina nomo albana en Ĉamerio

Varbilo dulingva albana- esperanta

Të mbështesësh ndryshimësinë gjuhësore

Në botë ekzistojnë, sipas një vlerësimi, rreth 6000-7000 gjuhë, por ato po zhduken mesatarisht nga një në javë. Gjuha është një mjet shprehës thelbësor i kulturës dhe i njëjtësisë. Vdekja e gjuhës e kufizon pasurinë e botës sonë, me po kaq siguri, sikurse vdekja e një lloji biologjik.

Apogi lingvan diversecon

En la mondo ekzistas laŭtakse inter 6000 kaj 7000 lingvoj, sed el ili pereas averaĝe po unu ĉiusemajne. Lingvo estas esenca esprimilo de kulturo kaj identeco. La morto de lingvo limigas la riĉecon de nia mondo, samcerte kiel la morto de biologia specio.

Internacia Ligo de Esperantistaj

Instruistoj

Lidhja Ndërkombëtare e Mësuesve
Esperantistë



Jen celoj de ILEI:

Ja qëllimet e ILEI-it:

Të synojmë drejtësinë e komunikimit

Drejtesia kërkon të drejtën e njërëzve për ta ruajtur trashëgiminë e vet gjuhësore, që mundësisht përfshin përdorimin e gjuhës vendase, shtetërore apo kombëtare dhe të tjerave për kontakte ndërkombëtare. Kemi nevojë për një zgjidhje për përdorimin ndërkombëtar, që të mos rrezikojë ekzistencën e vazhdueshme të gjuhëve vendase dhe kombëtare më pak të folura. Një zgjidhje funksionale është tashmë e disponueshme- Esperanto.

Celi al komunika justeco

Justeco postulas la rajton por homoj konservi sian propran lingvan heredaĵon, kiu eble inkluzivas la uzon de loka, ŝtata aŭ nacia lingvo kaj alia por transnaciaj kontaktoj. Ni bezonas solvon por internacia uzo, kiu ne endanĝerigas la daŭran ekziston de malpli parolataj lokaj kaj naciaj lingvoj. Funkcianta solvo estas je dispono - Esperanto fino pagho 1

komenco pagho 2

Të rrisë paqen

Esperanto formon një mjet ideal për t'i bashkuar njerëzit që përpiqen për paqë dhe zhvillim mbi baza ta barabarta, të qendrueshëm. Sepse pothuaj gjithë folësit e saj kanë vendosur me vetëdije ta përdorin gjuhën; për rrjedhojë ata janë ndërkombëtarisht të orientuar dhe shoqërisht të angazhuar.

Kultivi pacon

Esperanto formas idealan ilon por unuigi homojn strebantajn al paco kaj egalbaza, daŭripova evoluo. Tio, ĉar preskaŭ ĉiuj ĝiaj parolantoj konscie decidis ekuzi la lingvon; sekve ili emas esti jam internacie orientitaj kaj socie engaĝitaj.



Esperanto përmbledhazi

Esperanto është një 'sintezë gjeniale' e elementëve më të mirë të hequra nga një gamë e gjerë gjuhësh, e përpunuar për të mundësuar komunikimin ndërmjet popujve të vendeve dhe kulturave të ndryshme.

Falë strukturës së saj të saktë dhe të rregullt, ajo mësohet më lehtë se sa gjuhët etnike. Ndryshe nga ato, ajo na jep mundësi të komunikojmë mbi baza të barabarta midis popujve, sepse gjithkush ka bërë përpjekje për ta nxënë atë. Përdorimi i kësaj gjuhe me prirje zhvillimi, është propozuar në vitin 1887 nga L.L. Zamenhofi që përdoret nga një bashkësi domethënëse gjuhësore në 125 vende në botë, do ta provojë bollshëm investimin e të gjithë atyre që duan të bashkëveprojnë me të huajt pa u varur nga interpretuesit apo nga

ndonjë gjuhë tjetër hegjemone. Përdorimi i saj më i gjerë do të sillte që ligjëruesit në konferenca ndërkombëtare të vlerësohen sipas ideve dhe përmbajtjes së tyre, dhe jo sipas nivelit gjuhësor që ata zotërojnë në gjuhët që u kërkohen atyre.

Esperanto koncize

Esperanto estas ‚genia sintezo‘ de la plej bonaj elementoj tiritaj el vasta gamo de lingvoj, ellaborita por ebligi la komunikadon inter la popoloj de malsamaj landoj kaj kulturoj. Danke al sia preciza kaj regula strukturo ĝi estas pli facile lernebla ol la etnaj lingvoj. Kontraŭe al tiuj ĝi ebligas komunikadon egalrajte inter la popoloj, ĉar ĉiu faris la strebon ĝin lerni. La uzo de ĉi tiu evoluema lingvo, en 1887 proponita de d-ro. L. Zamenhof kaj uzata de signifa parolkomunumo en pli ol 125 landoj tra la mondo abunde pravigos la investojn de ĉiuj, kiuj deziras interagi kun eksterlandanoj sen dependi de interpretistoj aŭ de alia hegemonia lingvo. Ĝia pli vasta uzo rezultigis, ke la prezentaĵoj de prelegantoj en internaciaj konferencoj estu taksataj laŭ siaj ideoj kaj la enhavo, kaj ne la regonivelo atingita en la postulataj lingvoj.



Fino pagho 3

Komenco pagho 4

Kriteret për një gjuhë ndërkombëtare

Një gjuhë me ndikim, e drejtë për përdorim ndërkombëtar, duhet të jetë:

E qartë sipas domethënies - jo me dy kuptime apo e pasaktë.

E tejdukshme sipas strukturës.

Fonetike - në të folur e të shkruar harmonikisht.

E nxënëshme optimalisht - në disponim të gjithkujt.

Kriterioj por internacia lingvo

Efika, justa lingvo por internacia uzo estu:

- Klara laŭ signifo – ne dusenca aŭ malpreciza
- Travidebla laŭ strukturo

- Fonetika – parolo kaj skribo en harmonio
- Optimume lernebla – je dispono de ĉiu.

Qysh ta vlerësojmë Esperanton?

Kiel pritaksi Esperanton?

Si i plotëson ajo këto kriterere?

Kiel ĝi plenumas tiujn kriteriojn?

Qartësia e domethënies:

Esperanto i shmang homonimet, fjalët me shqiptime të mundëshme jo të njëjta dhe fjalët me shumë kuptime; ajo i shmang fjalët, që kryejnë funksione gramatikore të ndryshme pa i modifikuar (për shembull në anglisht fjala 'round' mund të lozë rolin si emër, mbiemër, ndajfolje, parafjalë ose folje).

Klareco de signifo:

Esperanto evitas homonimojn, vortojn kun malsamaj eblaj prononcoj kaj plursignifajn

vortojn; ĝi evitas vortojn, kiuj plenumas diversajn gramatikajn funkciojn senmodife (ekzemple en la angla la vorto 'round' povas roli kiel substantivo, adjektivo, adverbo, prepozicio aŭ verbo).

E tejdkshme strukturalisht:

Esperanto shenjon rolin gramatikor të fjalëve: -o për emrat, -a për mbiemrat, -e për ndajfoljet, -as, -is, -os, -u për foljet e tashme, të shkuara, të ardhshme dhe urdhëruese- etj. Si

rrjedhojë analiza e fjalisë është më e lehtë dhe domethënia e menduar është e qartë.

Travidebla strukture:

Esperanto markas la gramatikan rolon de vortoj: -o por substantivoj, -a por adjektivoj, -e por adverboj, -as -is -os -u por verboj nunaj, pasintaj, futuraj kaj imperativaj -ktp. Sekve fraz-analizo facilas kaj la intencata signifo estas klara.

Fonetike:

Kjo do të thotë, që secila nga 28 shkronjat e alfabetit për rrjedhojë paraqet vetëm një tingull: nuk ka shkronja të pazëshme. Kjo jep kursime të mëdha kohe në planin mësimor shkollor; shkronjëzimi thjesht nuk merr shumë orë, sikurse ndodh te gjuhët më pak fonetike, si anglishtja dhe frëngjishtja.

Fonetika:

Ĉi tio signifas, ke ĉiu el la 28 literoj de la alfabeto konsekvence reprezentas nur unu sonon; ne ekzistas silentaj literoj. Tio liveras grandajn tempoŝparojn en lerneja studplano; literumado simple ne forkonsumas amason da horoj, kiel okazas ĉe malpli fonetikaj lingvoj, kiel la angla kaj franca.

E nxënëshme optimalisht- në disponim të gjithkujt:

Falë skicimeve të sipërme, Esperanto është e nxënëshme deri në shkallën e përdorimit nga një shumicë e madhe popujsh të botës-

aftësia gjuhësore dhe kostoja nuk përbëjnë pengesë. Ndjenja e hershme e suksesit është thelbësore për formimin e një qendrimi pozitiv për një të nxënë të një gjuhe tjetër. Esperanto është një gjuhë që funksionon në formë të plotë, pjesët e saj më sfiduese nuk pengojnë një përparim të shpejtë të hershëm. Studimet tregojnë që ajo është 8-10 herë më lehtë e nxënëshme në krahasim me gjuhët e tjera.

Optimume lernebla – je dispono de ĉiu:

Dank' al la supraj skizaĵoj, Esperanto estas lernebla ĝis uzebla grado de grandega plimulto de la popoloj de la mondo – lingva kapablo kaj kosto apenaŭ formas baron. Frua sukcesento esencas por la formiĝo de pozitiva sinteno al plia lingvo-lernado. Esperanto ja estas plenformita funkcia lingvo, ĝiaj pli defiaj partoj ne malhelpas rapidan fruan progreson. Studoj montras ĝin inter 5- kaj 10-oble pli facile lernebla kompare al aliaj lingvoj.

Fino de pagho 5

Komenco de pagho 6

ILEI dhe qëllimet e tij

I pranishëm në 55 vende, me 35 seksione vendore. ILEI jep një bazë profesionale ndërkombëtare për mësuesit, që e flasin Esperanton. Ai synon veç kësaj ta nxitojë mësime të Esperantos si në shkollë ashtu edhe përmes Rrjetit, të stërvisë mësuesit, të zhvillojë provime, të botojë mjete mësimore moderne dhe t'i bashkojë mësuesit e Esperantos dhe nxënësit e saj.

ILEI kaj ĝiaj celoj

Ĉeesta en 55 landoj, kun 35 landaj sekcioj, ILEI donas transnacionan profesion bazon por

instruistoj, kiuj parolas Esperanton. Ĝi celas krome akceli la instruadon de Esperanto kaj en lernejoj kaj pere de la Reto, trejni instruistojn, okazigi ekzamenojn, eldoni modernajn lernilojn kaj kunigi instruistojn de Esperanto kaj iliaj lernantoj.

ILEI dhe botimet

Lidhja nxjerr dy revista; organin e vet zyrtar **Internacia Pedagogia Revuo** (Revista Pedagogjike Ndërkombëtare) për mësuesit dhe mësimehdhënësit dhe **Juna Amiko** (Miku i Ri) për nxënësit.

ILEI kaj eldonaĵoj

La ligo aperigas du revuojn; sian oficialan organon Internacia Pedagogia Revuo por la instruistoj kaj instruantoj kaj Juna Amiko por lernantoj.

IPR

Driemaandeliks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 43 - trimonata
13/1

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)
Luiza Carol
Stefan MacGill
Luigia Oberrauch Madella
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Aurora Bute
Renato Corsetti
Nina Danylyuk
Johan Derks
Magdaléna Fejtőová
Mariana Gencheva
Ronald Glossop
Mireille Grosjean
Sylvia Hämmäläinen
Marija Jerković
Dennis E. Keefe
Zsófia Kóródy
Katalin Kováts
Stefan MacGill
Luigia Oberrauch Madella
Raita Pyhälä
Franz-Georg Rössler
Josef Vojáček

ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj





ILEI dhe takimet

ILEI organizon konferenca çdo vit, me fije mbi baza dege, organizimi dhe dëfrimi në programe. Një listë e konferencave të kohëve të fundit dëshmon për ndërkombëtarësinë në rritje të lidhjes: më 2006 në Parma (Itali); më 2007 në Ranzan (Japoni); më 2008 në Porto Novo (Benin); më 2009 në Krakov (Poloni); më 2010 në Matanzas (Kubë); më 2011 në Kopenhagë (Danimarkë); më 2012 në Kunming (RP Kinës), më 2013 në Herzberg- Sieber (Gjermani); më 2014 në Montevideo (Uruguj); më 2015 në Oostende (Belgio) .

ILEI kaj renkontiĝoj

ILEI organizas ĉiuĵaran konferencon, kun fakaj, organizaj kaj distraj fadenoj en la programo. Listo de lastatempaj konferencoj atestas pri la kreskanta internacieco de la ligo: 2006 Parma (Italio), 2007 Ranzan (Japanio); 2008 Porto Novo (Benino), 2009 Krakovo

(Pollando), 2010 Matanzas (Kubo), 2011 Kopenhago (Danlando), 2012 Kunming (Ĉinio – vidu la bildon), 2013 Herzberg-Sieber (Germanio), 2014 Montevideo (Urugvajo), 2015 Oostende (Belgio).



Programet tona mundësojnë për fëmijët nga vende të ndryshme të zbulojnë kulturat njëra pas tjetrës falë gjuhës së përbashkët: disa dhjetëra projete të tilla janë realizuar në kuadër të programeve evropiane Comenius dhe Gruntvig.

Niaj programoj ebligas al infanoj el malsamaj landoj malkovri la kulturojn unu de la alia danke al komuna lingvo: plurdekoj da tiaj projektoj estis realigitaj kadre de la Eŭropaj programoj Comenius kaj Grundtvig.

Kontaktinformoj:

ilei.prezidanto@gmail.com

ilei.sekretario@gmail.com

ilei.officejo@gmail.com

Të dhëna për kontaktin

ilei.prezidanto@gmail.com

ilei.sekretario@gmail.com

ilei.officejo@gmail.com

www.ilei-mondo.info

www.ilei.info.

ILEI/ICH, Grubenhagen 6, DE-37412 Herzberg am Harz,
Allemagne; Germanio. tel./fax: (+49) 5521-5983.

www.lernu.net

www.edukado.net

<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

www.springboard2languages.org

www.linguistic-rights.org

www.noos.ch/ideo

Granda esperanta novaĵpaĝo surrete

<http://novajhoj.weebly.com/-nova309o.html>

Lernolibroj por la bibliotekoj

La unuan de aprilo estas enmanigitaj al la biblioteko de la Fakultato de Naturaj Sciencoj en Tirana kvin ekzempleroj de la Lernolibro de Esperanto por albanoj "Ĉu vi parolas Esperanton". Ĉikaze oni diskutis kun la bibliotekestro s-ro Petro Luarasi pri la eblecoj de propagando de ILO ankaux en tiu fakultato tra la bibliotekaj servoj.
Rita Permeti

Projekto de kunlaboro kun AIS

La sekretario de AEA, fruaprile 2014, renkontis cxe la katedro de matematiko en la Fakultato de Naturaj Sciencoj de Tirana universitato s-ron Kristaq Gjino, profesoro. Li informis lin pri la agado de AIS kaj ebleco de kunlaboro kun la ties profesoroj. Estis sugestitaj la prelegoj de profesoroj de AIS ankaŭ anta la studentoj kaj lektoroj de Tirana universitatoj pri temojel matematiko, astronomio, informadiko, lingvistiko, geografio, historio, ks.

Oni promesis pripensi la ideon kaj prezenti konkretan temaron kaj temon. Ni esperu ke AIS respondos pozitive, prikonsiderante ke Albanio ne ofertas tre luksan akomodigon kaj honorariojn...

Jen nia letero al AIS-sekretario tiucele:

Albana ILEI-sekcio

Retpaĝo: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html> aŭ
www.esperanto.net/al

Jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana

Adreso: p/a Bardhyl Selimi, Rr Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio

Rete: bselimi@gmail.com

Tel portebla: 00355682580758

Tirana,

la 4-an de aprilo 2014

PROPONO

Al

Akademio Internacia de la Sciencoj
Sekretario: Dr. Reinhard Fössmeier, informo@ais-sanmarino.org

Estimataj, enkadre de niaj kilopodoj por disvastigi Esperanton en Albanio, ni sugestas al vi kunlabori kun niaj universitatoj, prelegante ĉe ili pri temoj *de vi konataj kaj al ili interesaj*. Mi provis en la pasinto fari tion kun la ŝtataj universitatoj, sed sensukcese pro fakto ke iliaj rimedoj estas sufiĉe magraj. Tiel mi provis fari tion, unue, kun la privata renoma universitato "Tirana Eŭropa Universitato" kies rektoro, sinjoro prof. Asoc. Dr. **Tonin Gjuraj** sin esprimis tutpreta akcepti honorindajn profesorojn de AIS. Interalie, mi menciis la nobelpremiiton, s-ron Selten ,pri kiu li montriĝis tre entuziasma. Sed mi ne certas ĉu s-ro Selten akceptus alveni en mian landon kie sendube oni akceptus plejhonore kaj nin li ege helpus per sia reputacio.

Poste mi menciis s-ron Maitzen, prezidanton de AIS, kies prelegon pri astronomio mi sekvis en Roterdamo dum UK 2008, prof. Piennacchietti el Torino, kiun mi konas persone, prof. Minnaja el Padova same, prof. Corsetti el la universitato "La Sapienza" de Romo, prof. Quednau ka.


Mi petas vin diri ĉu viaj profesoroj pretus alveni en Tirana je oportuna tempo por ili kaj prelegi ,ni diru dum 1-2 tagoj en la Tirana Eŭropa Universitato? Eble, poste, oni akceptos ilin en nia Akademio de Sciencoj kies vivprezidanto, prof. **Gudar Beqiraj**, informadikisto, estas mia konato kaj en la ŝtata universitato kie same mi havas konatojn. Certe, la universitato envorte aranĝos vian vojaĝon kaj akomodigon. Mi, mem, anticipe enalbanigos la prelegon kaj tradukos simultane kiam vi prelegos.

Estas grave ricevi pozitivan respondon de vi, kio ege helpus nin kiel esperantista asocio, per via reputacio kaj sentemigus la studentojn pri Esperanto mem.

Plejkonsidere

Bardhyl Selimi

Prezidanto de la albana ILEI-sekcio



Shoqata esperantiste shqiptare

Njohur me vendim gjyqësor nr.3503 date 15/02/2013 nw Gjy katen e Tiranës

Adresa: p/a Bardhyl Selimi

rr Fortuzi9/1/3 Tirane 1016

e-mail: shabanhasani@gmail.com

www.esperantoshqipria.weebly.com/index.html

tel 0682080677

Tiranë , më prill 2014

Ministrisë së Arsimit dhe Sportit

Zonjës Lindita Nikolla

Rr. e Durrësit Tiranë

Propozim

Duke marrë nxitje nga projekti I fundit, il miratuar nga ajo Ministri, për të futur lëndën e Shahut, fillimisht në 10 shkolla fillore, si një mjet për aftësimin e mëtejshëm të nxënësve tanë, propozojmë që po kështu të futet, fillimisht në disa shkolla fillore, lënda e gjuhës **Esperanto**, si mjet ndihmës për përvetësimin paskëtaj më shpejt dhe më qendrueshëm të gjuhëve të tjera kombëtare që mësohen në shkollat tona.

Përvoja në këtë fushë ekziston, që disa dhjetëra vjet në Evropë (duke nisur me Institutin e Paderbornit në Gjermani nga prof. Helmar Frank e duke përfundur me praktikën disa vjeçare në disa shkolla fillore në Britani, në kuadrin e projektit “Trampolina Gjuhësore”, Springboard, drejtuar nga zonja Angela Tellier, www.springboard2languages.com). Ju kujtojmë që qeveria shqiptare e vitiit 1922, propozoi në Ligën e Kombeve, krahas disa shteteve të tjera anëtare, që të futej Esperanto në shkollat fillore. Mjerisht, delegati francez i atëhershëm, vuri veton. (duke menduar se frëngjishtja do vazhdonte ta mbizotëronte botën..)

Për këtë project ekzistojnë tekstet mësimore për shqiptarët, shumë materiale ndihmëse didaktike. Organizata Botërore e Esperantos (www.uea.org) dhe Lidhja Ndërkombëtare e Mësuesve Esperantistë (ILEI: www.ilei.info ne Esperanto dhe www.ilei-mondo.info ne shume gjuhe) janë të gatshëm të ndihmojnë duke organizuar kurse intensive dy-tre javore me mësuesit shqiptarë (përfshi ata të gjuhëve të huaja) që do ta jepnin mësim Esperanton të paktën një simestër. Në përfundim, këta mësues do pajiseshin me *Dëshmi gjuhësore* nga Instituti Ndërkombëtar i Esperantos IEI (www.iei.nl).

Mendojmë se kostoja e këtij projekti është minimale, por përfitimet për nxënësit janë të padiskutueshme. Njëkohësisht, dora dorës, përvetësimi i Esperantos do i përgatisë të rinjtë tanë më mirë për sfidat gjuhësore brenda BE.

Shpresojmë në mirëkuptimin tuaj dhe shprehim gatishmërinë për një sqarim më të hollësishëm nëpërmjet internetit ose në takime me ju.

Me konsiderat

Kryetari

Ing. **Shaban Hasani**

Koncize en Esperanto:

Nia asocio proponas al ministerio pri edukado kaj sporto enkonduki en kelkajn bazlernejojn esperanton cele al pli bona lernado de la ceteraj fremdlingvoj de ili. Antaŭ monato tiu ministerio decidis enkonduki ŝaklud- objekton en 10 bazlernejojn cele al pli bona kapabligo de la lernantoj..

F

Informaĵoj

El Pollando

LA NEKUTIMA RENKONTIĜO KUN NEKUTIMA HOMO

- malfermo de nova cikla programo en neesperanta medio
(Vroclavo/Pollando).

La 31an de januaro 2014 je la 14h00 en la Vroclava Centro de Pliĝuloj okazis la inaŭguro de tutjara programo kadre de la Akademio de Pliĝuloj sub komuna titolo: „Kia grandioza estas la mondo”. La programo estos okazigata ĉiun trian vendredon de monato kaj preparas ĝin la Centro de Interkultura

Edukado - Regiona Buroo Vroclavo (CIE-RBV). La celo de la programo estas stimuli aktivecon de la pliĝuloj, vigligi la kunlaboron kun neesperantaj medioj kaj disvastigi Esperanton. La anonco pri nia ciklo kaj pri la unua renkontiĝo aperis en la „Vroclava Gazeto”, kiu atingas grandan nombron da personoj.

La ciklon malfermis Halina Kuropatnicka-Salamon, vroclava poetino, prozverkistino, ano de la Asocio de Polaj Literaristoj, brajlistino, emerita instruistino de la pola lingvo kaj antaŭ ĉio esperantistino.

Sinjorino Halina rakontis pri tri Ludovikoj, kiuj havis grandan influon je ŝia vivo, pri Ludoviko Braille, Ludoviko Zamenhof kaj Ludoviko de la Sizeranne. Ŝi interese proksimigis



iliajn biografiojn kaj atingaĵojn. Dum la renkontiĝo la publiko havis eblecon ne nur vidi, sed ankaŭ tuŝi



librojn, kiuj estis skribitaj per brajlo kaj konvinkiĝi kiel grandaj kaj pezaj ili estas. Ekz. malgranda poŝvortaro pol-esperanta en brajlo konsistas el 9 dikaj volumoj.

Granda surprizo por la publiko estis prezento kiumaniere oni skribas kaj legas per brajlo. Ĝi estas reliefa skribo, kiu konsistas el punktoj, kiuj elstaras el la papero kaj oni legas ĝin tuŝe, palpante per fingropinto. La publiko kun granda admiro observis kiel Halina Kuropatnicka-Salamon rapide en brajlo skribis la frazon: „Jestem zadowolona, że jestem z wami” („Mi estas kontenta, ke mi estas kun vi”). Tamen, la plej granda surprizo estis skribita per brajlo dediĉo al ĉiu leganto en poeziaj volumetoj fare de la aŭtorino.

Bela kaj unika akcento de la renkontiĝo estis aŭskultado de poeziaĵoj, kiujn la aŭtorino mem legis. La publiko estis ravita per la neforgesebla etoso de la renkontiĝo.

Mi petis Halinan Kuropatnicka-Salamon, ke ŝi komencu nian novan serion de la renkontiĝoj kun neesperantistoj, ĉar ŝi estas bela modelo, kiun indas imiti. Tio estas tre modesta persono kun belega interno. Ĉiam ŝi volonte helpas neniam atendante ion. Ŝi havas en si mem multe da pozitiva energio per kiu ŝi ĉirkaŭradias. Ŝi vojaĝas tra Pollando sen konsideri sian aĝon kaj penojn de la vojaĝo, ĉeestante multajn aŭtorajn renkontiĝojn dum kiuj ŝi disvastigas Esperanton. Per sia vivo ŝi pravas, ke ekzistas neniu baro por esti feliĉa kaj aktiva en ĉiu momento de sia vivo. Per la ekzemplo de sia interesa vivo ŝi kuraĝigas aliajn personojn, kiuj ofte facile kapitulacas jam ĉe malgranda problemoj.

La 21an de februaro en la sama loko kaj je la sama horo okazos renkontiĝo kun Roman Dobrzyński. Ni jam invitas vin.

Por la estraro de la Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo
Vroclavo

Małgosia Komarnicka

[Sur la fotoj: 1. Małgosia Komarnicka salutas la publikon. 2. Halina Kuropatnicka-Salamon prelegas.]

NEKUTIMA ĜOJO DANK' AL ESPERANTISTOJ

La 7an de marto, vendrede, je la 14a horo en la Vroclava Centro de Pliaĝuloj (Vroclavo/Malsupra Silezio/Pollando) muzik-teatra grupo “Wspomnienia” („Rememoroj”) el Nowy Sącz, kiu konsistas ĉefe el esperantistoj, prezentis por neesperantistoj spektaklon „Jeszcze w zielone gramy ...” („Ni ankoraŭ verde ludas...”). Scenaron de la spektaklo verkis Halina Komar eluzante tekstojn de la ŝatataj kaj konataj versaĵoj kaj kantoj. Ĝi estas lirika, komika kaj nostalgia prezentado kiu montras diversajn etapojn de la vivo, de juneca amo ĝis bela maljunaĝo, kiu donas saĝon kaj pliprofundigas sentemon. La spektaklo permesis ankaŭ manifesti nekutimajn talentojn de la plenumantoj, kiuj en belega maniero montras admiron pri beleco de la mondo, eksterordinareco de la naturo, sed ankaŭ stimulas por agi, trovi sian lokon en la socio kaj konkordiĝi kun la pasinta tempo.

La organizantoj – t.e. la Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo (CIE-RBV) kaj la Vroclava Centro de Pliaĝuloj preparis surprizojn por virinoj, kies vestaĵoj havis plej multajn verdajn akcentojn.

La verda publiko ricevis bombonujojn kaj ĉokoladojn de la supervendejo Auchan, beligaĵojn de la firmao Oriflame kaj volumetojn de poezioj de Halina Kuropatnicka-Salamon, kiujn donacis la aŭtorino kaj la Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo.

La renkontiĝo amasigis tiom multe da personoj, ke la organizantoj devis fermi la liston de la partoprenantoj du semajnojn antaŭ la spektaklo. La publiko estis ravita pro la nekutima etoso kaj profesieco de la plenumantoj. Ĝi ofte kune kantis kaj premiis la ensemblon per laŭtegaj aplaŭdoj.

La vendreda renkontiĝo estis ankaŭ okazo por **enmanigi la Diplomon de Neforgesfloro al Halina Kuropatnicka-Salamon**. La Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo aljuĝas la Diplomon „al esceptaj personoj pro ilia escepta agado kaj antaŭ ĉio pro ilia modesteco”. Halina Kuropatnicka-Salamon ricevis ankaŭ de Jola Kieres Dank-diplomojn de la lernantoj, kiujn instruas Jola uzante la lernolibrojn de Halina Kuropatnicka-Salamon.

La 21an de marto en la la Vroclava Centro de Pliaĝuloj je la 13:00 okazos renkontiĝo kun Renata Mauer-Róžańska, ora olimpikistino. Ni invitas vin. (Vroclava Centro de Pliaĝuloj, ĉe Dominikana placo n-ro 6 /salono n-ro 210)

Por la estraro de la Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo

Malgosia Komarnicka

[Vi povas legi pole la informon de Vroclava Centro de Pliaĝuloj kaj rigardi fotojn:

<http://www.seniorzy.wroclaw.pl/index.php/component/content/article/1195-rozpiewany-dzie-kobiet-we-wrocawskim-centrum-seniora-.html>]

Rekordoj, interesaĵoj, jubileo ĉe Lingvo-Studio, L.S, 1984-2014

Ĝuste antaŭ 30 jaroj, en fino de februaro 1984 estis fondita nia malgranda entrepreno Lingvo-Studio, kiu estis kaj estas kerno de la nuna Budapeŝta Esperanto-Centro "Eventoj".

Ne multaj firmaoj ĝisvivas tiun aĝon, ĉefe ne en Esperantujo, do ni festas kun ĝojo la datrevenon! Dum la pasintaj 30 jaroj ni funkciis kiel Esperanta sonstudio, eldonejo, redakcio, ni organizis IJS-n, realigis plurajn rekordojn per la gazeto Eventoj, kaj plurajn aliajn kun nia nuna Esperanto-Lingvolejnejo.



Kelkaj el niaj fierataj aferoj:

– Antaŭ la interreta epoko dum 10 jaroj ni eldonis la novaĝgazeton Eventoj, kiu per sia 2-semajna (!) aperrito estis tiam **la plej ofta Esperanto-informilo**. Ĝi havis abonantojn en pli ol 65 landoj...

– Eventoj estis la unua (?) gazeto, kiu havis **regionajn represaĵojn**: la budapeŝta preseja originalo estis sendita per rapida poŝto al Pollando, Rusio kaj Litovio, kie oni presis kaj distribuis ĝin al enlandaj abonantoj - kun aldono de sia enlanda informilo...

– Eventoj estis la unua Esperanto-gazeto, kiu siatempe registris por si propran interretan domajnon: "eventoj.hu" kaj Eventoj estis la unua, kiu publikigis senpage en interreto sian tutan arkivon! (Pli frue tio ne estis kutimo.)

– La vorton "Lingvo" ni registris por 10 jaroj kiel **leĝe protektita varmarko**, kaj du niaj universitataj diplomverkoj (ambaŭ **pri merkato**) analizis la agadon de Lingvo-Studio :-)

– Ekde dekelkaj jaroj ni funkciigas **Esperanto-Lernejon** en Budapeŝto, kiu estas verŝajne la plej (?) granda en Esperantujo. Tri komplete instalitaj lernoĉambroj en 110 m², kie la Esperantajn **kursojn gvidas 5-8 instruistoj** laŭ kontraktoj... Lernis la lingvon ĉe

ni ĝis nun pli ol tri mil personoj... (!) - Mi nur bedaŭras iomete, ke pri tiuj sukcesoj oni ne trovas informojn en la revuo de ILEI.

– Laŭ mia scio nia instruila pakaĵo "Sukcese ĝis la E-ekzameno..." estas la **plej (?) ampleksa lernilo-kompleto** en Esperantujo, konsistanta el pli ol 10 integraj eroj! Ni funkciigas tutlandan libroservon kaj ankaŭ senpagan instruisto-peran servon, kiu proponas 96 privatajn Esperanto-instruistojn al dezirantoj dise en la lando.

– Ekde 2003 ni funkciigas propran, unikan, **pagan (!) interretan kurson** por hungaroj. NE TEMAS pri la Lernu-kurso, ni mem konstruis propran kurso-sistemon de nulo ĝis B2

(= meza nivelo), sen financado fare de ESF aŭ de alia asocio... Ne estis simple atingi, ke pli ol 4000 homoj elektu nian pagan kurson anstataŭ la senpaga Lernu...

– kaj estas kompreneble multaj aliaj interesaj projektoj.

Pri la pasintaj 30 jaroj de Lingvo-Studio, LS mi kompilis **mallongan resumon, kie la fotojn akompanas klarigaj tekstoj**. Ĝi estas trovebla ĉe la adreso: <http://www.eventoj.hu/lingvo-studio-jubileo30.htm>

La albumo estas publika, por rigardi ĝin vi NE devas esti membro kaj ne devas anticipi registriĝi, sed la plaĉon oni povas signi per la apuda butono :-)



Por komenci la albumon klaku sur la kandelan foton (kun la nombro 30). Dekstre estas legebla la klariga teksto. Se ĝi ne almetebblas al la ekrano, klaku sur la surskribon "Daŭrigo" (aŭ "Vidi pli"). Se vi metas la muson super la bildon, dekstre kaj maldekstre aperas blankaj sagoj por salti al la sekva bildo.

La [supra naskiĝtaga albumo](#) montras nur eventoj, ligitajn al Lingvo-Studio - sed ili estas nur malgranda parto de nia agado. Alian duonon – kiel STEB, Kalendaro, reklamkampanjoj de Eo, filmoj, Ret-Info, renkontiĝoj, FB, landa agado, ktp – ni faras kiel volontula laboro en la kadro de Fondaĵo Eszperantó kaj nia loka E-asocio.

László Szilvási, LS

Ret-Info / Lingvo-Studio, LS
<http://www.eventoj.hu>

El la leteroj

Interŝanĝo de opinioj de Bardhyl Selimi kun Valentin Melnikok rilate Krimean krizon

La aferoj de Krimeo kaj Kosovo diferencas:

> Mi ne komprenas kial la parlamento de Krimeo komparas sian staton al tiu de Kosovo. Kosovo siatempe spertis genocidon far ŝtata serba terorismo, dum neniu ruso mortigis far ukrainanoj.

> En Kosovo aktuale la serboj loĝas amase kaj ĝuas rajtojn relative plejmulte en Eŭropo.

Ĉio, kion mi legis ĝis nun, asertas la malon.

> En la parlamento el 120 sidlokoj ili disponas pri 20 sidlokoj! Dume Rusio ankoraŭ ne agnoskis la novan ŝtaton, agnoskita jam el pli ol 107 UN membroj!

Rakontu, sur kio baziĝas ekonomio de Kosovo. Ĉu tie ekzistas industrio, scienco? Kion oni eksportas?

> Rilate Krimeon, jen du mapoj kiuj speguligas la procentaĵon de rusaj etnuloj en diversaj ties regionoj.

La ciferoj estas ŝokige falsaj.

Mi estis ĉiam surprizita kiam eklernis pri tiom multe da rusoj loĝantaj eĉ en aziaj eksaj sovetiaj turksimilaj respublikoj kie eĉ TV kanaloj parolas ruse. Mi memoras ŝerce la diraĵon de Stalin, la plej granda komunista krimulo, rilate ukrainanoj: mi volus ilin deportigi (kiel tion li faris en baltaj respublikoj...) sed bedaŭrinde ili

estis tiom multe...

Laŭ mi por Krimeo estus pli bone plu vivi enpace kun ukrainanoj kaj kun ili eniri EU baldaŭ.

Post kiam Bardhyl sendis ampleksan materialon pri historio kaj geografio de Kosovo:

- Grandan dankon pro alsendita teksto pri Kosovo k Albanio.

Ĝi estas pensiga, k draste malsamas kun tio, kio tradicie estas dirata en Rusujo.

Ja Rusio ĉiam aliancis kun Serbio.

Niaj amaskomunikiloj en 1990j ripetis la tezon, ke Kosovo estas historie serba tero, ĉar antaŭ jarcentoj tie okazis iu fama batalo kontraŭ turkoj. Mi ne estas serbo, nek historiisto, do ne povas scii detalojn pri tio - k evidente, diversaj landoj havas diversajn opiniojn.

Do, se juĝi laŭ via teksto, Krimeo nun havas ne malpli da kaŭzoj por sendependiĝi for de Ukrainio k aliĝi al Rusio.

Rusio milit-akiris Krimeon komence de 18a jc. Pli frue Krimeo estis turka.

Ekde tiam Krimeo ĉiam estis parto de Rusio, k Ukrainio simple ne ekzistis kiel aparta ŝtato.

En 1954 Ĥrusĉov arbitre transdonis Krimeon al Ukrainio - sen demandi lokajn loĝantojn (same kvazaŭ oni vendas sklavojn aŭ kamparanojn-servutulojn, sen demandi ilian konsenton). Sed enkadre de USSR tio malmulte gravis: oni libere vojaĝis, k plejparto de potenco estis en unu centro, en Moskvo, ĉefurbo de tuta USSR.

Nur en 1992 aperis sendependa Ukrainio, k la vivo en Krimeo tuj malboniĝis.

La pasintaj jaroj klare montras, ke Ukrainio ne povas normale ekzisti kiel aparta ŝtato, kun propra ekonomio. Nur malhonestaj trukoj kiel rifuzo pagi rusian gason k diversaj ĉantaĝoj ebligas iel subteni la ekonomion kontraŭ kolapso. Sed ĉio havas finon, k nun ĝi venas.

Mi estis en Krimeo en 1977, 1984 k 2008, en diversaj lokoj. Ĉie oni parolas nur ruse. Neniu ukrainlingva ŝildo ks videblas.

Nuna naciisma registaro de Ukrainio (aperinta rezulte de sanga puĉo) likvidas eĉ minimuman aŭtonomion de Krimeo, eĉ minimumajn rajtojn por uzi la rusan lingvon. Nature, la popolo protestas.

Hieraŭ okazis la referendumo en Krimeo. Partoprenis ĉ. 80%, el ili pli ol 95% voĉdonis por aliĝo al Rusio.

Usono k EU diras, ke ne agnoskas la rezulton. Ĉar aliĝo de Krimeo al Rusio estas bono por ambaŭ, sed kio bonas por Rusio, tio nepre estas kontraŭ "intereso" de Usono, ĉar lezas ties monopolon regi la mondon.

Pri Kosovo estis male: la sendependiĝo estis malbono por Serbio => malbono por Rusio => bono por Usono. Tial klaras la duoblaj normoj...

> Kara V. Melnikov, ĉu vi sekvis la eventojn en Kosovo dum la jaroj 1998-1999 kaj tiujn antaŭ ĝi en Bosnio, Kroatio kaj Slovenio?

Tiom, kiom eblis de malproksime...

> Ĉu vi ankoraŭ ne konvinkiĝas pri la kulpo de la serba registaro tiutempa de Miloŝeвиĉo?

En ordo, Miloŝeвиĉ estis aĉulo, sed ĉu pro tio necesis bombi Serbion, murdante dekmilojn da pacaj loĝantoj?

K poste oni mortigis lin en prizono, timante, ke li publike diros ion gravan, ne konforman al oficiala vidpunkto...

> Ankoraŭ vi metas la signon de egalaĵo inter la agresinto kaj la viktimo?

Ĉu en Kosovo albanoj ne murdis serbojn?

Mi legis rakonton de serbino, kiun albanoj forpelis el ŝia domo, forpreninte tutan ŝian havaĵon. Ŝi restis viva. Kiu provis rezisti aŭ simple ne emis forveturi - estis kruele murdita...

Ĉu vi legis la libron de Spomenka Ŝtimec "Kroata milita noktlibro"?

Mi kunsendas fragmentojn el la teruraĵoj spertitaj de albanaj etnuloj tiutempe en Kosovo far serba polico, armeo kaj antaŭarmeo. Ne forgesu: en Kosovo loĝas en siaj propraj teroj je pli ol 90 % albanaj etnuloj!

>Tiel estas NUN. Antaŭ jarcentoj Kosovo estis pure serba regiono.

Nu, mi ne povas diri, kiuflanke estis genocido en Kosovo... minimume ekzistas "diversaj opinioj" tiurilate, k estas fakto, ke serboj tie ne plu vivas.

Sed ĉiakaze estas pura vero, ke en Kosovo estis murditaj miloj da homoj, sed en Krimeo neniu.


Do tiam la "politike korekta" Eŭropo simple ektimis, ke banditoj faros teroron en diversaj landoj, k ne enmiksiĝis, agnoskis sendependecon de Kosovo.

En Krimeo oni ne murdas - tio, laŭ bandita logiko, estas signo de malforteco. Tial Usono k NATO volas trudi sian volon.

Kievaj puĉistoj ĉiel strebas malpermesi referendumon - ĉar ili tro bone scias, kian rezulton ĝi donos.

Pli ol 80% loĝantoj de Krimeo estas rusoj, k ili ne volas subiĝi al naciismaj banditoj el Kievo k okcidenta Ukrainio.

Mapo de Krimeo



Letero de Birgitta Anevik

Mi jhus venis hejmen post busvojugho al Skovde. Dum sufiche longa tempo, mi serchis iun svedan/albanan asocion. Per facebook mi trovis malgrandan en Mariestad chirkau 50 kilometroj iom norde de Lidköping. Mi skribis al viro, kiu shajne respondecas pri la asocio. Antauhierau li skribis al mi, ke li intencas prelegi kaj montri kelkajn bildojn pri vojagho al Albanio pasintan autunon. La ejo estos, do, nun estis, iu loko en Skovde.

Mi ne estas tute certa, sed mi pensas, ke alia tre eta asocio invitis lin. Nu, mi promenis post la busveturado al loko en kelo.

Mats Rydgard, kiu prelegis, diris, ke kelkaj membroj de la sveda/albana klubo vizitis malgrandan montaran vilahgon, Lubonja, en la sudorienta parto de Albanio. La klubo laboras pri projekto, oni helpas la malrichajn homojn tie, ekzemple pri studoj en la angla. La sveda grupo havis tradukiston dum la vojagho, kiu parolis la anglan. Li estas instruisto por la gejunuloj en la vilagho (Lubonja).

La bildoj kaj la prelego estis interesaj.

Sed mi ne renkontis iun albanon. Mi komprenis, ke Mats, la preleganto, tute ne konas la albanan lingvon, char li demandis min pri bazaj ecoj de la lingvo. Li pensis, ke esperanto kaj la albana estas preskau la sama!

Kompreneble li konis nenion pri esperanto. Mi lin informis iom hodiau.

Mi ne scias, chu mi povas havi kontakton kun la asocio en Mariestad, char ili havas kunvenojn tiel malfrue.

Pro tio mi ne povas hejmenveni sen auto.

(Chu vi konas la vilaghon Lubonja?)

Morgau Gunnar, la barbulo, dum klubkunveno rakontos pri sia restado en Rusio dum monato pasintan autunon.

Li jhus revenis de vojagho al Brazilo. Baldaŭ li vojaghos al Francio kaj poste al Rumanio, etc. Mi konas nenion alian, kiu tiel multe vojaghas!!

Amike Birgitta

Eble vi scias ke mi partoprenos la feston en Borås (la urbo, kie Sokol vivas) la 29an de marto?

Unue mi skribis al Julietta, kaj demandis shin, chu shi konas Sokolon. Shi skribis, ke shi konas lin, kaj shi kaj shia edzo iros al Borås. Samtempe shi sendis al mi la programon de la festo.

Do, mi scias pri kio temas! La unua albana-sveda vortaro nun estas preta! Tre bone! Oni ankaŭ tradukis plurajn svedajn infanlibrojn en la albanan. Dum la festo oni donos premiojn al tradukistoj kaj verkistoj. Sokol intencas iri al Abanio en aprilo por distribui la infanlibrojn en diversaj albanaj lernejoj.

Estas ghene, ke mi ankoraŭ tiel malmulte/malbone scipovas la albanan! Sed Julietta, shia edzo kaj Sokol parolas ankau la svedan (eble ankau aliaj personoj). Alie mi ne kuraghus iri al la festo.

Mi intencas kunporti la libron en esperanto "Hunda hauto" kaj la gazeton "Mapo" de la 18a de aprilo 2012, kie oni povas legi pri la esperanta eldono. (Mi ricevis la gazeton de Gunnar, kiam li revenis de Albanio.)

Eble iu volas scii, kial mi ekstudas la albanan. La respondo estas danke al esperanto!

Chu vi konas Sokolon persone? Chu vi renkontis lin?

Korajn salutojn, Birgitta

Nia propagando

Afiŝo de Esperanto en la albana



DITA E ESPERANTOS

2013

Drejtësi gjuhësore


Më 26 korrik 2013






Google ne Esperanto



Propagandaj materialoj el Brazilo





Italaj esperantistoj de Milano en aktiveco, marto 2014



Lokaj lingvoj

"Lokaj lingvoj estas la pli granda parto de la parolataj lingvoj de nia planedo en la kampo de sciencoj. Ili estas ankaŭ la pli minacataj. Ekskludi lingvojn signifas senigi iliajn parolantojn je ilia fundamenta rajto pri akiro de sciencaj konoj.

Samtempe, la alproksimiĝo de popoloj en "mondan vilaĝon" eĉ pli necesigas la strebadon por interkultura kompreno kaj dialogo. En la hodiaŭa mondo la normo estas uzo de minimume tri lingvoj, unu loka, unu pli vaste uzata kaj unu internacia lingvo por komuniki sur niveloj loka kaj tutmonda. Tiu diverseco lingva kaj kultura estas probable nia plej granda ŝanco por la futuro: por kreemo, novigo, inkluziveco. Ni ne malŝparu ĝin."

ESPERANTO 2014 Justa komunikado

Kiom longas la lernado de esperanto kaj de la alngla?

How long time you need to learn

ENGLISH



1500 hours

Mo	Tu	We	Th	Fr	Sa	Su
1	2	3	4	5	6	7
8	9	10	11	12	13	14
15	16	17	18	19	20	21
22	23	24	25	26	27	28
29	30	31				

Mo	Tu	We	Th	Fr	Sa	Su
		1	2	3	4	5
6	7	8	9	10	11	12
13	14	15	16	17	18	19
20	21	22	23	24	25	26
27	28	29	30	31		

or 2 months

ESPERANTO



150 hours

Mo	Tu	We	Th	Fr	Sa	Su	Mo	Tu
1	2	3	4	5	6	7		
8	9	10	11	12	13	14	6	7
15	16	17	18	19	20	21	13	14
22	23	24	25	26	27	28	20	21
29	30	31					27	28

or 7 days

Joao Santos



FLUGHAVENO

1. aviadilo/aeroplano
2. elirpordego
3. pasporto
4. piloto
5. stevardino
6. bagaĝbendo
7. bagaĝĉareto
8. enirpermesilo
9. aerodromo
10. doganejo



WWW

Marto

10							11							12							13						
Sa	Di	Lu	Ma	Me	Jaiŭ	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Jaiŭ	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Jaiŭ	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Jaiŭ	Ve
1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28



★ **Esperanto.**
Lingvo
Internacia kaj Facila
<http://lernu.net>



Artikoloj

La genia fenome no Kuçi

Inter la enprizonigitoj en la koncentrejo de Dachau (Bavario) dum la Dua Mondmilito estis ankaŭ 120 albanoj. Inter tiuj sin distingas dr. Ali Kuçi (Kuçi). La dokumentoj de la Arkivo de la Koncentrejo Dachau evidentigas la fakton ke Ali Kuçi estas ludinta gravan rolon en la juĝprocesoj kontraŭ nazioj, post la fino de la Dua Mondmilito. Tiuj juĝprocesoj nomataj “La Juĝprocesoj de Dachau” servis kiel modelon por la aliaj juĝprocesoj okazontaj poste en la aliaj koncentrejoj. La fakto ke Ali Kuçi posedis perfekte la germanan kaj la anglan, same aliajn lingvojn, lia vasta kulturo kaj la talento surkampe de ĵurnalistiko igis lin unu el la plej elstarajn figurojn tiutempe. Tial, Markus Smith, alia eminentulo en la koncentrejo, konsideris lin “La genia fenomeno Kuçi”.



Jen fragmento el la juĝproceso kie Dr. Ali Kuçi estis atestanto:

D: Via nomo, mi petas?

R: Ali Kuçi.

D: Kie vi naskiĝis dr. Kuçi?

R: Mi naskiĝis en Albanio.

D: Kiam vi naskiĝis?

R: Mi naskiĝis je 14-an de marto 1914.

D: Kion vi estas studinta?

R: Mi studis pri Politikaj kaj Ekonomiaj Sciencoj en la universitato de Londono, poste studis Filozofion en la universitato de Florenco.

D: Ĉu vi diplomiĝis en la universitato de Londono?

R: Jes.

D: Ĉu vi doktoriĝis pri filozofio en la universitato de Florenco?

R: Jes.

D: Ĉu vi estis enprizonigita en la Koncentrejo de Dachau?

R: Jes, sinjoro.

D: Kiam oni venigis ĉi tien, en la koncentrejon de Dachau?

R: Oni venigis min en Dachau je 10-an de Julio 1944.

D: Ĝis kiam vi restis en la koncentrejo de Dachau?

R: Ĝis la 29-an de aprilo 1945.

D: Ĉu vi konstatis, dum la tempo de la restado en Dachau, sinjoro doktoro, ke oni entreprenis amasajn homtransportoj de la enprizonigoj?

R: Jes.

D: Je kiu tago?

R: Okazis multaj tiaj transportoj...

D: Kiam okazis la lasta amasa transporto tiaspeca?

R: ...Je 25-an de aprilo 1945.

D: Kiom da personoj estas transportitaj tiutage?

R: 2400.

DE: Kiom da personoj survivis dum ĉi tiu transporto: Nur 600...

(laŭ de libro de Gjelok Markaj, eldonejo Dija, Pogradec, Albanio, 2011)



Situacio en Ukrainio kaj Esperanto-movado

– de Dima Ŝevĉenko en

http://www.ipernity.com/blog/dima_ŝevĉenko/713025 –

Karaj amikoj! Multaj el vi diversmaniere sekvas novaĵojn pri tio, kio okazas nun en Ukrainio.

Mi neniam volis komenti iujn politikajn aferojn, ĉar ĝenerale politiko aspektas por mi, kiel iu globala “trompludo”, en kiu ni, la kutimaj homoj, ne havas eblecon ion ŝanĝi aŭ ion decidi.

Nun okazis tiel, ke “malgranda” konflikto en Ukrainio tre rapide transformiĝis al la globala milito, kiun partoprenas

preskaŭ ĉiuj gravaj politikaj kaj militaj fortoj de la mondo. Esperantistoj estas nur “garantiuloj” kaj pretervolaj partoprenantoj de la situacio.

Mia familinomo estas la sama, kiel tiu de Taras Ŝevĉenko - la fondinto de la moderna ukraina literaturo. Tamen mi naskiĝis en Moskvo kaj ne konas la ukrainan lingvon.

Por mi ne tiom gravas ĉu Ukrainio aŭ ĝia parto iĝos parto de Rusio aŭ male estonte ambaŭ sendependaj landoj iĝos parto de Eŭropa Unio (aŭ iu alia granda ŝtato). Ĉiu popolo rajtas elekti la propran vojon kaj decidi, kiamaniere pli komforte kaj pace kunvivi kun la aliaj.

Refoje la registaroj strebas malproksimigi tiun ĉi celon, semas malamon inter ni, manipulante niajn cerbojn per diversaj amaskomunikilaj metodoj.

Ni jam spertis epokon de “Fera kurteno”, kiam “okcidentaj” kaj “orientaj” esperantistoj estis dividitaj. Tio kaŭzis tion, ke la ĉefaj E-movadaj organizoj, strukturoj aranĝoj ktp. iĝis plejparte “okcidentEŭrop-orientitaj”. Kiam la “Fera kurteno” falis “orientaj” esperantistoj kaj ilia kontribuo al la monda Esperanto-movado kaj kulturo ekaktiviĝis. Esperanto iĝis vere multe pli internacia ilo.

La plej grava celo de Esperanto estas paca komunikado kaj kunvivado de ĉiuj popoloj de la mondo. Pasis jaroj kaj nuntempaj politikistoj konstruas novan “Feran kurtenon”, kiu promesas iĝi eĉ pli danĝera por Esperanto, ol tiu antaŭa. Militoj, ekonomikaj kaj politikaj bataloj detruas E-movadon.

Ĝuste Esperanto protektas la naciajn lingvojn per sia neŭtraleco. Tamen la politikistoj nur unuavide subtenas "protektion" de la naciaj lingvoj. Ekz. tiu ĵusa histerio pri la rusa lingvo en Ukrainio. Rusia ŝtato kvazaŭ "volas protekti"

rusan lingvon, tamen malpublike trudas lernadon de la angla amase kaj ĉie.

Kio okazas nuntempe:

- Loĝantoj de Rusio kaj Ukrainio havas grandajn problemojn por viziti EU-landojn (kie historie okazas plejparto de gravaj E-eventoj). Tio iĝas pli kaj pli malfacile, la ŝtatoj pli kaj pli striktigas regulojn de tiaj vojaĝoj. Nuntempe, por ekz. civitano de Rusio povu partopreni iun E-kongreson en EU, devas pasi multajn formalajn procedurojn, elspezi multe da tempo kaj mono, humiliĝi antaŭ la diversaj ŝtataj instancoj. Same loĝantoj de EU havas multajn problemojn por viziti Rusion. Post tiu ĉi konflikto sendube tio iĝos ankoraŭ pli malfacile. Pro tio stagnas internacia komunikado dum E-aranĝoj en Rusio.
- Dum 2014 jaro en Ukrainio (ankaŭ en Krimeo) estas planataj minimume 5 relative grandaj internaciaj E-aranĝoj kaj pluraj malpli grandaj. Verŝajne plejparte ili estos nuligitaj, sed eĉ se iuj el ili okazos, apenaŭ esperantistoj el Rusio kaj EU povus veni tien pro la kompreneblaj cirkonstancoj.
- Kio okazos kun la unua rusia SES, kiu estas planata ĉi aŭguste apud Moskvo kaj aliaj E-aranĝoj? Neniu nun povas prognozi, tamen mia ial pensas, ke nenio bona...
- Pro tiu ĉi konflikto kutimaj homoj (do ankaŭ esperantistoj) en Rusio kaj Ukrainio draste malriĉiĝas. Tio signifas, ke ili havos malpli da monrimedoj kaj tempo por la regiona E-movado kaj vojaĝoj eksterlanden. Nuntempe tio okazas plej akre en Ukrainio, kiu situas sur la “sojlo” de la ekonomika kolapso. Tamen “eĥo” aperis ankaŭ en Rusio. Ekz. nur dum du pasintaj monatoj rublo

malplikostiĝis je 10-15%, kompare al eŭro kaj dolaro. Kaj tio estas nur komenco... Do, tio signifas, ke se iu rusia esperantisto ekvolus nun veturi al iu Eŭropa E-aranĝo li devus elspezi je 10-15% pli, ol antaŭ 2 monatoj!

- Same okazas granda bato al eĉ sen tio malforta “Esperanto-infrastrukturo”. Ekz. pro falo de rublo prezoj por eldoni librojn kaj lernolibrojn de Esperanto kreskegas, sed esperantistoj ne havas eblecon aĉeti ilin plikoste. Krome, ekz. nia eldonejo Impeto estas la plej granda liveranto de Esperantaj lernolibroj kaj vortaroj por Ukrainio. Mi dubas, ke pro tiu ĉi krizo novaj Esperanto-lernantoj en Ukrainio povus ricevi la bezonatajn studmaterialojn dum la venontaj monatoj.

Tio estas nur kelkaj aktualaj pritaksoj de la situacio.

Kaj fine, esperantistoj estas kutimaj homoj. Foje ili akceptas iujn politikajn opiniojn de iu el la militantaj flankoj kaj tiamaniere dispecigas E-movadon, detruante ĝiajn ĉefajn trajtojn.

Kion fari?

Analiza novaĵletero de la grupo 'Keep Talking', kaj la Veromovado de Berkshire, Britio, por januaro-februaro 2014 (2014-03-07)

* Orvela lingviko - ĝisdatigo

Mi estis ĉe internacia evento en Germanio dum semajno post

Kristnasko, kie mi prelegis pri Novparolo de George Orwell, el lia libro 'Mil Naŭcent Okdek Kvar', komparante la version de Orwell kun la hodiaŭa politika parolado (<http://ifflg.free.fr/Ukd/if/ĉefa.html>). Kvankam la vortoj malsamas, Orwell tute pravis rilate al la metodoj de lingva manipulado. Mi iom detalogis pri la maniero en kiu la angla vorto 'terrorism' [terorismo] transformiĝis de sia origina signifo de ŝtata terorismo sekve de la Franca Revolucio, al agoj de perforto fare de individuoj kontraŭ la ŝtato, kaj kiel ĝi tiam plue estis transformita al jura obskuraĵo pere de parlamenta akto, tiel ke pli-malpli iu ajn kiun ne ŝatas la ŝtato povus esti jure akuzita laŭ la Terorisma Akto. Mi montris ankaŭ, ke la vortara difino de la Esperanta vorto 'terorismo' konservis sian originan signifon, kaj tio ilustras, kial por la Angla-Usona Establaĵo multkulturismo kaj multlingvismo prezentas danĝeron. Oni ne povas trompi ĉiujn kulturojn samtempe, kaj do por la mondo-imperiistoj, lingva hegemonio estas plej alta prioritato. Rilate al 9-11, necesis nur, ke mi montru bildon de unu el la eksplodantaj turoj, dirante "Tion ne kaŭzis flugmaŝino", sekvata de foto de strat-manifestacio kun standardo kun la vortoj "Monda Komerca Centro, Konstruaĵo 7, ne tutsimpe sin eksplodigis!". Nun ĉio estas tre kredebla. Plue, mian prelegon mi faris sub aŭspicio de la Internacia Akademio de Sciencoj de Sanmarino (<http://www.ais-sanmarino.org/index.html>).

Kiam mi revenis el Germanio, la lando estis en fervora furoro pri la Unua Mondo-Milito.

* Propagando pri la Unua MondMilito - sed ĉu ĝi retrofatos? Persista propaganda kampanjo estas trudata al la brita popolo por pravigi la rolon de Britio en la komenco de la Unua Mondo-Milito. La grupo 'No Glory in War' [Nenia Gloro en Milito] publikigis malferman leteron 'Kiel ni memoru la unuan mondan militon?' (<http://noglory.org/index.php/open-letter>), en kiu ili diras, ke ili maltrankviliĝis aŭdi, ke David Cameron planas elspezi £55,000,000 por "vere naciaj memorfestoĵ" por

marki tiun ĉi datrevenon. "Anstataŭe, ni kredas, ke pli gravas memori, ke tiu ĉi estis milito pelata de la konkuro de la grandaj potencoj por influo ĉirkaŭ la terглоbo, kaŭzante gradon de suferado tro evidenta en la statistika registro, de 16 milionoj da homoj mortaj kaj 20 milionoj vunditaj", asertas la letero.

Mi sekvis prelegon antaŭ Kristnasko en la televid-kanalo de BBC de profesoro Vernon Bogdanor, titolita 'Diplomatio: Sir Edward Grey kaj la Krizo de 1914' (<http://www.bbc.co.uk/programmes/b03d08k0>). La prelego defendis la rolon de la brita eksterlanda ministro Sir Edward Grey, kiun pridubigis libro de Christopher Clark, eldonita en 2012, titolita 'The Sleepwalkers: How Europe Went to War in 1914' [La somnambuloj: Kiel Eŭropo ekmilitis en 1914] (<http://www.harpercollins.com/browseinside/index.aspx?isbn13=9780061146657>). Lia prelego ŝajnis esti strukturita en iaspeca sonato-formo. En la Ekspozicio li elmetis klaran argumenton, ke unueca Germanio fariĝus nevenkebla industria kaj ekonomia konkurado al Britio, kaj ke iuj homoj en la brita Establaĵo serĉis manieron tion haltigi. Tiam li evoluigis la temon, enirante amason da detaloj, komencante per Sarajevo, kiu neniel rilatis al la centra temo de kreskanta germana industria kaj ekonomia potenco. La detaloj fariĝis tiom labirintecaj, ke mi dubas, ĉu multaj povis ĉion sekvi, eĉ antaŭ ol konsideri esti konvinkitaj pri ties vero. Tiam, atingante la finon de la Evoluiga sekcio, li enĵetis diron de Winston Churchill, ke la Kaiser - la germana imperiestro - havis militajn imperiismajn ambiciojn. La Temripeta sekcio estis entute bazita sur tiu enĵetita aserto, kaj kiel la brita registaro ne havis alternativon ol ekmiliti por tion haltigi. Tiu falsa ligo per obskurigo estas tipa de la maniero en kiu oni evoluigas politikan propagandon por intence prezenti falsajn argumentojn. Mi opinias, ke multaj historiistoj perceptas siajn rolojn kiel defendi la nacian heredaĵon anstataŭ objektivaj analizi pasintajn okazaĵojn.

Ĉiuj el la argumentoj por militado kiujn mi ĝis nun aŭdis agnoskas la kreskantan industriigon kaj ekonomian potencon de Germanio, kaj tiam ŝajnas suferi de amnezio en la evoluigo de la argumento surbaze de io tute alia. BBC kompreneble devas esti vidata kiel senpartieca, kaj do ĝi devis produkti unuhoran programon por prezenti la kontraŭan argumenton. Profesoro Niall Ferguson prezentis unuhoran prelegon bazitan sur lia libro 'The Pity Of War: Explaining World War I' [La Domaĝo de Milito: Klarigi la Unuan Mondo-Militon] (<http://www.basicbooks.com/full-details?isbn=9780465057122>), en BBC 2 la 28an de februaro (<http://www.bbc.co.uk/mediacentre/proginfo/2014/08/the-pity-of-war.html>). Li argumentas, ke la milito estis eraro, kaj tion mi komence komprenis kiel eŭfemismon por 'krimo'. Sed lia argumento fakte ne ekskludis la ideon, ke estis krimo. Lia ĉefa argumento estis, ke Britio estus pli forta en la longa daŭro se ĝi ne estus ekmilitinta. Mi supozas, ke estas eraro krimi kiam ne necesas.

La retejo de 'No Glory in War' enhavas multajn interesajn artikolojn pri la nuntempa propaganda kampanjo (<http://noglory.org/index.php/articles>), kiel ankaŭ kalendaron de eventoj (<http://noglory.org/index.php/events>). Mi ĵus ricevis ilian novaĵleteron; vi povas ĝin peti pere de ilia kontakto-paĝo.

Ni devis prokrasti paroladon en Londono en februaro de nia grupo Keep Talking fare de Nick Kollerstrom titolitan 'Pri la eviteblo de la Unua Mondo-Milito', pro striko de la subtera fervojo, sed ĝi tre sukcese antaŭeniris la kvinan de marto. Li publikigis artikolon pri la temo en la retejo 'Inconvenient History' [Neoportuna Historio], (http://inconvenienthistory.com/archive/2011/volume_3/number_4/on_the_avoidability_of_world_war_one.php), kaj tion mi trovis kleriga. Mi ĵus ektrovis pluan informon, ke Kaiser Wilhelm efektive provis averti la britan Establaĵon pri la

danĝeroj prezentitaj de bankisto J.P. Morgan, per provo monopoligi la mondon komercan ŝipadon, ĝis tiam regatan de la britoj, kaj ke Germanio kaj Britio alianciĝu kontraŭ Usonon por tion ĉesigi. Tio okazis en 1901, do kio okazis?

Mi diskutis pri la Unua Mondo-Milito post la Kristnasko kun diversaj homoj en Germanio el diversaj landoj, kaj demandis ilin, ĉu iliaj landoj memorfestas la eventon. Neniu sciis ion ajn pri tio. Ŝajnas, ke Britio estas la sola lando kiu tiom furoras, kvankam, John Morgan en Aŭstralio diras al mi, "La propagando pri la Unua Mondo-Milito ĉi tie estas grandega, kaj daŭris persiste dum proksimume 15 jaroj!". Mi persone opinias, ke estis por la registaro granda eraro, ĉar ĝi dubigas pri la rolo de la brita Establaĵo en tiu grandioza decido, inter milionoj da homoj kiuj alie apenaŭ pensus pri ĝi. Pli-malpli ĉiu nun akceptas, ke la brita registaro kapablas fabriki pretekstojn por militoj, kaj menciitajn en tempo kiam ili fabrikas pli da militoj estas memgolo.

* Okupataj teritorioj, kaj la juda rezisto

Do ĝuste kiu regas aferojn de malantaŭ la kulisoj en la Okcidento? Aperis interesa artikolo de Kevin Barrett en la retejo de la irana Press TV, titolita 'Usonanoj elparolas pri "israeligo" de Usono'

(<http://www.presstv.ir/detail/2014/02/17/351047/zionists-celebrate-occupation-of-usa-americans-protest/>). Li raportis: "La esprimo 'Israele okupataj teritorioj' ordinare aludas al Palestino. Sed pli kaj pli da usonanoj elparolas pri la 'israeligo' de Usono - kaj scivolas, ĉu ankaŭ ilia lando estas okupata". Li skribis pri la "cionista puĉo de la 11a de septembro, 2001, kiu trudis preskaŭ-totalan cionistan regon sur Usonon". Ĉu aŭ ne oni akceptas tiun interpreton, ŝajnas al mi, ke oni ĝenerale akceptas, ke la post-911-ajn eventojn diktas la Uson-Israela Komitato de Publikaj Aferoj (AIPAC), kiu jar-konferencas dum

mi skribas. Kevin Barrett skribis: "Kontraŭ-AIPAC-a sento disvastiĝas tra ĉiuj segmentoj de la usona socio. Eĉ la usona juda komunumo, iama bastiono de preskaŭ-monolita subteno por Israelo, nun inkluzivas kreskantan ĥoruson da kontraŭ-cionistaj voĉoj".

Mi aldonis komenton: "Mi pripensas tiujn homojn kiel Judan Mafion. Tio evidentigas, ke la plimulto de la judoj ne estas akuzataj pri komplico. Se usonaj judoj vekiĝas, kiel vi sugestas, do tio estas bona novaĵo. Mi opinias, ke okazas io simila ĉi tie en Britio. Eksa parlamentano por la Laborpartio Gerald Kaufman iam estis cionisto, sed naŭziĝis pro la israela traktado de la gazaanoj, kaj tiutempe faris forte trafan paroladon en la parlamenta Ĉambro de Komunumoj". Mi aludis al intervjuo kun Gerald Kaufman en la prezento 'Sputnik' de George Galloway, en RT la 15an de februaro (<http://rt.com/shows/sputnik/economic-political-crisis-thatcher-016/>). Mi antaŭe raportis, ke multaj britaj judoj distancas sin de tio kio okazas en Israelo. Tamen la Amikoj de Israelo en la brita parlamento ŝajnas havi nedecan influon sur la brita eksterlanda politiko. La brita eksterlanda ministro William Hague ekzemple membras en la Konservativaj Amikoj de Israelo.

* Ukrainio - kaj la nigra mono malantaŭ Maidan

La 25an de februaro reprezentantoj de 30 politikaj partioj kaj publikaj organizaĵoj en Ukrainio sendis apelacion al la Ĝenerala Sekretario de UN kaj al la gvidantaro de EU kaj Usono, titolitan 'Ĉesigu la gerilan vagabondadon: haltigu la inciton al enlanda milito, puĉo kaj disiĝo de nia lando!'. "La preteksto por organizi la Eŭromajdanon en Kievo estis la rifuzo de la registaro kaj la prezidento de Ukrainio subskribi Konsenton de Asociiĝo kun EU", ili atentigas. Ili tiam detaligas iujn el la konsekvencoj por Ukrainio se tiu interkonsento estus subskribita, kaj tiam priskribis iujn el la ligoj kiujn havas la

manifestaciantoj kun naziaj partioj en Ukrainio
(<http://orientalreview.org/wp-content/uploads/2014/02/Ukraine-appeal-against-Nazi.pdf>).

La revuo 'Executive Intelligence Review' de Lyndon LaRouche publikigis analizon de la evoluoj en Ukrainio, titolitan 'Western Powers Back Neo-Nazi Coup in Ukraine' [Okcidentaj potencoj subtenas nov-nazian puĉon en Ukrainio] (<http://www.larouchepub.com/pr/2014/140203ukrainefactsheet.pdf>), reproduktita en Oriental Review [Orienta Revuo] en Moskvo (<http://orientalreview.org/2014/02/06/western-powers-back-neo-nazi-coup-in-ukraine/>). "Protestantoj de la opozicia partio Svoboda, antaŭe nomata la Socialist-Naciistoj, marŝis sub la ruĝa kaj nigra flago de la Organizaĵo de Ukrainaj Naciistoj (OUN-B), de Stepan Bandera, la naziaj kunlaborantoj kiuj eksterminis judojn kaj polojn kiel kromagadon por la nazia militmaŝino, kaj plenumo de la propraj radikalaj ideoj pri genta pureco, dum la Dua Mondo-Milito", laŭ la raporto.

La raporto ankaŭ spuras la ligojn de Bandera kun MI6, aranĝitajn de antaŭa altnivela nazio en la germana Orienta Ministrejo, Gerhard von Mende, kiu ebligis al MI6 trejni agentojn kaj enfaligi ilin en Sovetunion por plenumi operaciojn de sabotado kaj murdo inter 1949 kaj 1950. De marto 1956 Bandera laboris por la germana BND, kaj estis murdita de KGB en 1956. En 2010, la usonaj Naciaj Arĥivoj publikigis raporton 'Hitler's Shadow: Nazi War Criminals, U.S. Intelligence, and the Cold War' [La ombro de Hitler: naziaj militkrimuloj, usona spionado, kaj la Malvarma Milito], de Richard Breitman kaj Norman Goda, kiu inkluzivis detalan klarigon pri la dumilita nazia koluzio kaj enplektiĝo de Bandera kaj Lebed en la amasa ekzekutado de judoj kaj poloj. Sed la raporto malkaŝis, ke la afero estas pli kompleksa ol tio. Bandera mem estis enkarcerigita de la nazioj, kaj MI6 kaj CIA ne vidis aferojn pri lia uzo per samaj okuloj. Kiam li laboris por

BND li koluziis kun von Mende, tiutempe Okcident-germana registara oficisto. Sed tiu reto ja, ŝajne, kreskis per varbado de eksaj nazioj. Do nun ŝajnas, ke tiu reto estas ĵus aktivigita de Usono por malstabiligi Ukrainion.

La Organizaĵo de Ukrainaj Naciistoj (OUN) havas du branĉojn, OUN-B, ligitan al Bandera, kaj la pli malnovan OUN-M. Nun komparu la emblemon de OUN-M

(https://en.wikipedia.org/wiki/Organization_of_Ukrainian_Nationalists) kun tiu de Operacio Gladio de NATO (https://en.wikipedia.org/wiki/Operation_Gladio).

La 7an de februaro estis metita en YouTube sonregistraĵo de du usonaj oficialuloj kunordigantaj siajn agojn rilate al la instalado de marioneta registaro en Ukrainio. Victoria Nuland estas Vic-Ministro por Eŭropaj kaj Eŭropaziaj Aferoj en la usona Eksterlanda Ministrejo, kaj ŝi diskutis kun Geoffery R. Pyatt, la usona ambasadoro al Ukrainio

<http://www.youtube.com/watch?v=sS8yL_OHSUs>. Nuland faris eraron diri "F**ck the EU" ['Fekon al EU'; laŭvorte: 'Fiku EU' - konsiderata en la angla tro maldeca por plene literumi], kaj tio ne nur insultis ilin, sed diris ankaŭ, ke Usono, ne EU, estras Ukrainion. Mi rimarkis, ke ili implikis ankaŭ la Ĝeneralan Sekretarion de UN, Ban Ki Mon, en sia komploto. Transskribo kaj analizo de tiu aperis en Oriental Review [Orienta Revuo] sub titolo 'What about apologizing to Ukraine, Mrs Nuland?' [Kion diri pri partonpeto al Ukrainio, s-ino Nuland?] (<http://orientalreview.org/2014/02/07/what-about-apologizing-to-ukraine-mrs-nuland/>). Mi ŝajne memoras, ke Victoria Nuland estis vidata en la Placo Maidan en Kievo pli frue dum la armitaj manifestacioj, disdonante biskvitojn al protestantoj, kiel raportis kaj la usonaj amaskomunikiloj (<http://www.cbsnews.com/news/us-victoria-nuland-wades-into-ukraine-turmoil-over-yanukovich/>) kaj la rusaj amaskomunikiloj (http://voiceofrussia.com/news/2013_12_11/US-s-Nuland-

[treating-Ukrainian-protesters-to-cookies-on-Maidan-1129/](#)).

Evidente tiu estas orkestrumita por malstabiligi Ukrainion fare de Usono.

Sed la biskvitoj povus esti nur simbolaj. Kurt Nimmo, de Infowars, raportis pri multe pli signifa financado ol nuraj biskvitoj (<http://www.infowars.com/soros-activists-take-over-ukrainian-government-buildings/>). "Frue lundon membroj de Spilna Sprava transprenis la Ministrejon de Justeco en Kievo kaj postulis, ke Prezidento Viktor Yanukovich demisiu", li skribis. Tiam li klarigis: Spilna Sprava, tradukata kiel 'La ĝusta faro', estas grupo subtenata kaj financata de Open Society Institute [Instituto por Malferma Socio]. Tiu Open Society Institute, de George Soros, nun konata kiel Open Society Foundations (OSF) [Fondaĵo por Malferma Socio], disdonas subvenciojn al aktivistaj Ne-Registaraj Organizaĵoj en centra Eŭropo, provante subfosi la Rusan Federacion" (<http://www.infowars.com/soros-activists-take-over-ukrainian-government-buildings/>). Tiu inkluzivas la International Renaissance Foundation [Internacian Renesancan Fondaĵon] en Ukrainio (<http://opensocietyfoundations.org/about/offices-foundations>). Li donas ligon al la jarraporto de 2009 de la Internacia Renesanca Fondaĵo (http://www.irf.ua/files/eng/AnnualRep_eng_FINAL_17_06.pdf), kiu ja listigas Spilna Sprava.

"Imagu la reagon de Usono se duagrada oficialulo aŭ el la rusa aŭ el la ĉina eksterlanda ministrejo disdonus manĝaĵon al protestantoj en Occupy Wall Street [Okupu Wall Street] en Vaŝintono kaj urĝigus ilin supervenki, eventuale perforte", skribis Wayne Madsen en decembro pasinteĵare, en artikolo titolita 'Ukraine: NATO's Eastern Prize' [Ukrainio: la orienta premio de NATO] (www.voltairenet.org/article181535.html). Li ligis la aktivecojn de George Soros kun la "artefarita strat-revoluciaj taktkoj de CIA-taktikisto Gene Sharp por formi la

kernan strategion de la usona nov-konservativula celo trudi "Novan Usonan Jarcenton" sur la tutan mondon". Gene Sharp aktivas en du Ne-Registaraj Organizaĵoj, OTPOR kaj la Centro por Aplika Neperforta Agado kaj Strategioj (CANVAS), kiun Wayne Madsen priskribas kiel "avangardaj organizaĵoj por organizi kontraktitajn tumultantajn kontraŭregistarajn protestojn ĉirkaŭ la terglobo". Antaŭ nelonge oni malkovris, pere de likitaj retleteroj, ke la fondinto de CANVAS, Srdja Popovic, kunlaboradis kun spionfirmao STRATFOR, kun ligoj kun CIA kaj Pentagono, fondita de George Friedman, kies ligoj al la usona kaj israelaj milit-spionaj instancoj estas bone konataj", li skribis. Li eĉ montras identajn flugfoliojn, unu en la araba kaj unu en la ukraina, uzataj respektive en la placo Tahrir kaj Maidan.

En 'alternativa historio de Eŭromajdano', Katya Gorchinskaya skribas en 'Kyiv Post', "Tiu homoj estas tre bone pagataj pro siaj penoj, kaj estas bone ekipitaj. La grandeco de la usona diplomatia ŝarĝo kreskis kvaroble depost la eko de la tumultoj - kaj tio estas signo, ke la usonanoj transportas tien ĉion por helpi al protestantoj. ... La usonanoj disdonas kontantan monon por iuj aktivistoj (sekvas nomoj), \$50,000 ĉiufoje nur por fuelo, ĝuste en la tereno de la usona ambasadorejo. Iuj protestantoj ricevas pli ol \$500 tage pro partopreno en la protestoj, kaj la pago kreskas des pli da molotovaj kokteloj oni ĵetas al la sendefendaj policanoj, kiuj havas la leĝon siaflanke por uzi armilojn en tiaj kazoj, sed anstataŭe ili agas kun granda sinrego" (<http://www.kyivpost.com/opinion/op-ed/katya-gorchinskaya-the-ruling-partys-view-of-euromaidan-335812.html>).

Ĝuste kiam mi supozis, ke mi finfaris tiun ĉi elskribaĵon, kaj pretigis min por iri al la kunveno de Keep Talking pri la Unua Mondo-Milito, RT malkaŝis sonregistraĵon inter Catherine Ashton, de EU, kaj la estona eksterlanda ministro, en kiu li asertis, ke oni komprenis, ke la kaŝpafistoj kiuj pafis la

policianojn en la placo Maidan estis la samaj kaŝpafistoj kiuj pafadis al la protestantoj, kaj ke ili estis luitaj de la gvidantoj de Maidan (<http://rt.com/news/ashton-maidan-snipers-estonia-946>). The Guardian metis ligan al la tuta konversacio, raportante 'Ukraine crisis: bugged call reveals conspiracy theory about Kiev sniperŝ [Ukraina krizo: subaŭskultita voko malkaŝas konspirteorion pri kievaj kaŝpafistoj] (<http://www.theguardian.com/world/2014/ukraine-bugged-call-catherine-ashton-urmas-paet>). Do kial ili malestimas tion kiel 'konspirteorion', kaj kial la tradiciaj amaskomunikiloj malestimas tiujn kiuj faras ilian laboron por ili? Antaŭa Konservativa Defendo-Ministro Michael Portillo agnoskis en la programero de BBC 'This Week' [Ĉi-semajne] la 6an de marto, ke la rusoj havas argumenton (<http://www.bbc.co.uk/programmes/b03xkc8b>), kaj antaŭa Konservativa Defendo-Ministro Michael Heseltine, en Question Time [Demando-Tempo], ĵus antaŭe, admonis kontraŭ Okcidenta interveno en Krimeo (<http://www.bbc.co.uk/programmes/b03xk3r9>). Li sidis apud antaŭa kremlina konsilisto Aleksandr Nekrassov, kiu levis la aferon de luitaj kaŝpafistoj. Li bone defendis sin kontraŭ la konstanta interrompado de militema David Aaronovitch, kontraŭ-konspirteoria propagandisto, maskeradante kiel respektinda ĵurnalisto de The Times. Politikistoj antaŭe diris, ke ili bezonas unuanimecon tra EU. Sen tiu unuanimeco mi ne opinias, ke ili povas antaŭeniri kun iu ajn signifa agado, kaj espereble ankaŭ Usono vidos la aferon tiel. Ŝajnas al mi, ke tiu indikas turnopunkton en la ukraina krizo, kompareblan kun la malvenko de la militemuloj en la kazo de Sirio. Ekde la komenco de tiu ĉi krizo ĝis tiu turnopunkto estis ĝuste 106 tagoj. Tio ŝajnis rapida, sed se la afero estus antaŭenirinta kun la rapido de la Unua Mondo-Milito, ne estus jam en milito du tagojn post la Kristnasko.

Prognozisto de politikaj trajtoj Gerald Celante, en intervjuo la 27an de februaro asertis, "La bazlinio estas, ke la rusoj ne

rezignos la kernan havenon de Sevastopol ĉe la Nigra Maro. Sed kiam ni aŭdas Usonon averti Rusion, ke ĝi ne enplektiĝu, tio estas kompleta hipokriteco. Usono jam elspezis \$5 miliardojn por malstabiligi Ukrainion. ... Mi ne kredas, ke la politikistoj aŭ la militistaro kuraĝus minaci eniri ajnan armitan konflikton kontraŭ Rusio, ĉar se ili farus, tio estus la komenco de la Tria Mondo-Milito. Kaj kiel diris Albert Einstein, 'Mi ne scias, per kiaj armiloj oni batalos en la Tria Mondo-Milito, sed por la Kvara Mondo-Milito oni batalos per bastonoj kaj ŝtonoj.'".

(http://kingworldnews.com/kingworldnews/KWN_DailyWeb/Entries/2014/2/27_Celente_-

[Putin, Ukraine, World War III %26 Einsteins Warning.html](http://kingworldnews.com/kingworldnews/KWN_DailyWeb/Entries/2014/2/27_Celente_-Putin,_Ukraine,_World_War_III_%26_Einsteins_Warning.html)). Nu, ĉu estas homoj en Vaŝingtono kiuj voleme iniciatus Trian Mondo-Militon? Mi opinias, ke estas. Ne multo ŝanĝiĝis depost 1914, escepte, ke la armiloj estas pli detruigaj, kaj la centro de potenco ŝoviĝis el Londono al Vaŝingtono. Se ili miskalkulis, laŭ mi temas pri la ŝanĝo en publika opinio en la Okcidento kontraŭ pluaj militoj, kiel dramece ilustris la historia rifuzo de la brita parlamento sankcii intervenon en Sirio. Tro da homoj scias, ke ili mensogis pri 9-11, kaj gravas teni tiun aferon viva.

* Maskerado ĉirkaŭ la morto

Tia financado pere de George Soros levas demandon, ĉu ĉiuj organizaĵoj kiujn li finance subtenas estas frontaj organizaĵoj. Mi estis antaŭ jaroj nekomprenema, ke li neniam subvenciis Esperanto-organizaĵon, kvankam en sia junaĝo li estis en la Esperanto-movado konata. Lia frua vivo pli vaste konatiĝis kiam estis tradukita en la anglan libro de lia patro, 'Maskerado ĉirkaŭ la morto'

(<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=6497>) kiel 'Masquerade: Dancing around death in Nazi occupied Hungary' [Maskerado: Dancante ĉirkaŭ la morto en nazie okupata Hungario

(<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=6318>). Do ĉu li ŝanĝis sian vidpunkton, aŭ ĉu li estis falsulo? George Soros ĉeestis Esperanto-kunvenon tiom lastatempe kiel 2010, kie li estis fotita parolante kun la tradukiinto de la libroj de sia patro (<http://bulteno.esperanto-usa.org/2011/1/08-loke.html>). Kiel povas Esperanto-parolanta hungara judo fine trovi sin financanta la tiajn homojn de kiuj li supozeble eskapis per maskerado kiel gojo?

Nun mi vidas, ke estas lingvo-lernejo Soros en Sarajevo, kiu instruas la anglan kiel fremdan lingvon (<http://www.soros-school.com/>). Unuavide, ne estas en tio kontraŭdiro, kaj cetere multaj Esperantistoj sentas sin pozitivaj pri lerno de aliaj lingvoj. Sed se oni metas en kuntekston de la Anglo-Usona Establaĵo, kiu antaŭenigas la 'Anglaparolan Ideon', ni ne parolas pri filantropa subteno de dua lingvo por la mondo, sed por anglalingva hegemonio, flank-al-flanke de milita kaj financa hegemonio.

Kiam George Soros rompis la Bankon de Anglio en Nigra Merkredo, la 16an de septembro 1992 (<http://www.theguardian.com/business/2012/sep/13/black-wednesday-20-years-pound-erm>), mi scivolis, ĉu li estas financa geniulo, aŭ ĉu estis iu malantaŭ li, eble provizanta internajn informojn. Mi ĵus trovis ampleksan raporton pri 'George Soros as Rothschild Agent' [George Soros kiel agento de Rothschild] de iu Peter Myers, kiu baziĝas sur diversaj raportoj de analizistoj (http://www.bibliotecapleyades.net/sociopolitica/esp_sociopol_rothschild06.htm). Tiu inkluzivas resumon de artikolo de William Engdahl pri 'The Secret Financial Network Behind "Wizard" George Soroŝ [La sekreta financa reto malantaŭ 'sorĉisto' George Soros] (http://www.larouchepub.com/eiw/public/1996/eirv23n44-19961101/eirv23n44-19961101_054-the_secret_financial_network_beh.pdf). En ĝi, Engdahl

klarigas: "Tiu ĉi reto, nomata de siaj membroj la 'Club of the Isleŝ [Klubo de la Insuloj] konstruiĝis sur la frakasaĵo de la Brita Imperio post la Dua Mondo-Milito". Ni ne miru, ke ili nomis ĝin 'Nigra Merkredo'; 'Soroŝ estas la hungara vorto por 'nigra'.

Do mi supozas, ke se George Soros povas rompi la Bankon de Anglio, li povas rompi ankaŭ la bankojn en Ukrainio. Estas ironie, ke iuj landoj estas en terura financa stato ĉar ili aliĝis al EU, dum Ukrainio estas en malfacilo ĉar ĝi restis ekstere. Estas ankaŭ ironie, ke Catherine Ashton kaj aliaj gvidantoj de EU vokas por demokratio en Ukrainio, kiam Italio ĵus akiris sian trian neelektitan registaron, kaj Catherine Ashton neniam elektiĝis al ajna publika ofico en sia vivo.

Salutas Ian
Keep Talking
ian@fantom.org.uk

Berkshire 9/11 Truth
<http://berkshire911truth.blogspot.com/> (novaĵleteroj: Ian Fantom)

Keep Talking administras retan diskutgrupon anglalingvan, '911keep talking' kaj ĉiumonatajn kunvenojn en Londono. Retleteru al mi por pluaj informoj.

Solidareco kaj homaj rajtoj

• **Paiva Netto**

-
-
-

•
Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) ĉiujare aŭspicias kunsidon de Komisiono pri la Situacio de Virinoj. Kun granda honoro, Legio de Bona Volo (LBV) prestiĝdone partoprenas kun sia kontribuado, de pluraj jaroj, en tiu rimarkinda internacia renkonto.

Virinoj estas ĉiam veraj subtenantoj de ĉiuj nacioj, kiam ili integriĝas je Dio aŭ je idealoj plej noblaj, al kiuj homoj povas aspiri: Plejalta Bonkoreco, Frata Amo, Supera Justeco, Reala Frateco — eĉ se ili ne adoptis religian tradicion. Nenio estas pli sentema ol koro de spirite klarmensa virino. Kaj kion alian la mondo bezonas, precipe en tempo malfacila, kiel tiu, en kiu ni vivadas? Ĝi bezonas altajn sentojn en spirito de paco, konkordo, solidareco, karitato, dialogo, dinamika frateco, kiu solvas sociajn problemojn sen pli malbonaj sekvoj.

Ni gratulas pro la atingitaj venkoj ene de tutmondaj celoj por progreso, proponitaj de UN, en la jaro 2000. Tamen, ni scias, ke ankoraŭ multo restas farenda por la proksimulo. Jen kial estas grava la nuna temo en la agendo por diskutado fare de Ŝtatoj-Membroj, internaciaj delegitaroj, aŭtoritatuloj kaj ceteraj partoprenantoj en tiu konferenco, kiuj kunsidas en Novjorko, Usono: *“Defioj kaj atingoj en realigado de Jarmilaj Evoluigaj Celoj, koncerne virinojn kaj knabinojn”*.

Temas pri oportuna momento por analizi la ĝustajn punktojn kaj klopodi atingi ankoraŭ plibonigadon, kiu devas okazi, cele al solvoj, ekzemple, sur la kampo de edukado, de sano, de batalado kontraŭ malriĉeco kaj kontraŭ perforto, inter kiuj la fia seksekspluatado de virinoj, junulinoj kaj knabinoj. Ni ne rajtas iam cedi rilate la bataladon por homa digno kaj por forigo de socia malegaleco kaj seksa malegaleco en la mondo.

Estas neakceptebla, ke en nia mondo, laŭ kalkuloj de Monda

Organizo por Sano (OMS, angle), po unu el tri virinoj suferas iaspecan perforton (korpan aŭ seksan), en kio ŝia kunvivanto mem (aŭ ne) estas la faranto.

Estas esence grave, ke oni progresu ankaŭ por la fino de malsamecoj en salajroj inter viroj kaj virinoj, por pli egalecaj mastrumaj sintenoj en la labormerkato kaj en dividado de hejmaj taskoj inter viroj kaj virinoj. Fine, temas ĉiam pri garantiado de principoj de civitaneco kaj homaj rajtoj.

Libereco, devoj kaj rajtoj

Ĉi-rilate, mi prezentas mian kontribuaĵon esprimitan en modestaj prelegoj, publikigitaj interalie en la libro Meditadoj kaj Pensoj — Dialektiko de Bona Volo (1987) kaj en la Manifesto de Bona Volo (la 21-an de oktobro 1991).

Supozi, ke eblas rajtoj sen devoj estas konduki al grava perdo la celkaŭzon de libereco. Gravus klarigi, ke kiam mi montras la devojn de civitanoj super iliaj propraj rajtoj, mi tute ne defendas misformitan komprenon pri laboro, en kiu sklaveco estas plej abomeninda aspekto.

Pro tio, ni deziras, ke ĉiuj homoj estu efektive egalaj laŭ rajtoj kaj ŝancoj, kaj ke iliaj sociaj, intelektaj, kulturaj kaj religiaj meritoj, eĉ se plej laŭdataj kaj rekonataj, ne flankenmetu la rajtojn de la ceteraj civitanoj. Ĉar **libereco sen respondeco kaj frateco estas kondamno al ĥaoso.**

Ni do laboras por ia socio, en kiu la Kreanto kaj Liaj Leĝoj de Amo kaj Justeco inspiru zorgemon pri individua libereco. Tion al ni transdonas la Konstanta Kristnasko de Jesuo, nome la universaleca mesaĝo de la Dia Liberiganto, Tiu, kiu per Sia ofero sin donis al la Homaro. Ĉio tio celis la garantion pri sekureco politika, socia, jura, sub Lia dia rigardo (...).

La verkistino, franca filozofo kaj feministo **Simone de**

Beauvoir (1908-1986) bele esprimis la gravecon de solidareco kaj sindediĉo al la proksimulo, kiam ŝi diris:

— *Vivo konservas sian valoron kiam ni atribuas valoron al la vivo de aliuloj, per amo, amikeco, indigniĝo, kompatemo.*

Efektive, realaj virtoj estas tiuj, kiujn konsistigas la homo mem per honesta ĉiutaga okupiĝado, per administrado de siaj havaĵoj kaj per respekto pri la aliulaj aferoj, en la bela kaj instiga vivaventuro. Nacio, kiu konstruiĝas per tiaj elementoj estos ĉiam forta kaj nevenkebla.

La dezirata libereco

Laŭlonge de eraoj, la studadon pri Juro oni iom post iom perfektigadis, por doni garantiojn pli kaj pli solidajn al la socio.

La 20-a jarcento, ekzemple, heredigis al ni grandegan instruon per sinsekvaj civilaj konkeroj, fronte al plej grandaj malfacilaĵoj travivitaj de popoloj.

Antaŭ multenombraj epizodoj registritaj laŭ pasado de la tempo, oni povas konkludi, ke la homo bezonas la panon de libereco. Tamen, ne ekzistas vera libereco se ĉi tiun ne prilumas frata kaj solidara sento. Ĉio cetere riskas fali en ĥaoson, kaj la Historio estas plena je ekzemploj, kiuj pruvas tiun realaĵon.

Ni do omaĝu tiujn aktivulojn, kiuj laŭlonge de la Historio celis liberecon kaj dignajn vivkondiĉojn, speciale batalemaj virinoj. Ili ĉiutage almetas sian propran vivon por apogi siajn idojn, ĉu ili estas biologiaj idoj, ĉu adoptitaj, ĉu, kiel mi kutimas diri, idoj, kiuj signifas grandajn realigojn favore al la Homaro. Ĉiuj virinoj estas patrinoj.

Unu el tiuj brilaj virinoj estis la brazila infankuracisto, sanitaristo kaj fondinto de Paŝtist-misio por Infanoj, doktorino
Zilda Arns (1934-2010), kiu asertis:

— *Socia laboro bezonas mobilizadon de fortoj. Ĉiu homo kunlaboras per tio, kion li scipovas fari, aŭ per tio, kion li povas doni. Tiel, oni plifortigas la strukturon, kiu subtenas agadon kaj ĉiu sentas, ke li estas ĉelo por la transformado de la lando.*

“Malneto el Ĝenevo”

Alia batalanto estis **Eleanor Roosevelt** (1884-1962), vidvino de la usona prezidento **Franklin Delano Roosevelt** (1882-1945). Ŝi estris, ekde januaro 1947, la Komisionon por Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj, ĝis la aprobo de 30 alineoj, en tiu memorinda decembro 1948. Konsiderata kiel motoro de tiu projekto, s-ino Eleanor gvidis grupon da 18 partoprenantoj el heterogena formiĝo kultura, politika kaj religia, kaj ŝi ellaboris tion, kion oni ekkonis kiel “Malneton el Ĝenevo”, en septembro 1948, kaj oni prezentis kaj submetis ĝin al aprobo de pli ol 50 ŝtatoj-membroj. Kun granda fiero mi rememorigas la partoprenon de grava brazila ĵurnalisto, mia kara amiko **Austregésilo de Athayde** (1898-1993), unu el la plej elstaraj kunlaborantoj

en tiu eksterordinara laboro. Li okupis ankaŭ la prezidantecon de la Brazila Beletra Akademio (ABL, portugale), dum 34 jaroj, kaj de la Honora Konsilantaro por la Konstruado de Parlamundi de LBV, en Brasília/DF, Brazilo.

Eleanor Roosevelt estis la aŭtoro de ĉi tiu penso:

— *Libereco faras grandegan postulon al ĉiu homo. **Kun libereco venas respondeco.** Por homo, kiu hezitas kreskadi, por homo, kiu ne emas surporti sian propran ŝarĝon, ĉi tiu estas timiga perspektivo. (Nia estas la tekstoemfazo.)*

Granda Familio, la Homaro

Mi esperas, ke ankoraŭ en ĉi tiu 21-a jarcento, ni sukcesos solidigi tiujn noblajn idealojn kaj plivastigi ilin al ĉiuj popoloj sur la Tero, por ke ili estu plene travivataj. Kaj ke oni ne plu ripetu fiaskojn, kiuj okazis en antaŭaj jarcentoj.

Koncerne tion, jen estas konsidero de Mahatmo **Gandhi** (1869-1948):

— *Se ni deziras progresi, ni devas ne ripeti la historion, sed fari novan historion.*

Je la 58-a okazigo de tiu eminenta evento, kies centro de proponoj estas virinoj — de kiuj ni lernas zorgi pri aliaj homoj kun detala atento kaj oferemo —, **kion ni ambicias, krom la peto, ke la Homaro estu pli homeca al si mem?** Ni deziras vidi la aŭroron de tago, kiam fine ni rekonu nin reciproke kiel gefratojn, membrojn de unu sola familio, kiu pace vivas en ĉi tiu monda loĝejo.

Tion revis la kudristino **Rosa Parks** (1913-2005), aktivulo pri civilaj rajtoj de afrikdevenaj usonanoj. Tiu sentima virino foje asertis:

— *Mi pensas, ke ni staras ĉi tie, sur la planedo Tero, por vivi, kreski kaj fari kion ni povas por ke ĉi tiu estu pli bona mondo kaj por ke ĉiuj homoj estu liberaj.*

Mi kutimas aserti, ke humileco estas, super ĉio, kuraĝa.

Kaj Rosa Parks fariĝis simbolo en la batalado por raso egaleco kaj por la estingado de antaŭjuĝoj en Usono. Ŝia ŝajne eta gesto — kiam je la 1-a de decembro 1955, ŝi rifuzis cedi lokon al blanka viro en omnibuso, en la urbo Montgomery, Alabama — signifis rompon de katenoj de

rasisma tiraneco. Tiutempe, eĉ se ekzistis divido de sidlokoj por blankuloj kaj negroj, ĉi tiuj devis stariĝi favore al blankuloj, se ĉiuj sidlokoj en veturilo estus okupitaj.

Tiaj ekzemploj nur plifortigas tion, kion mi diras jam de jardekoj: Valorigi virinojn estas dignigi virojn. Kaj reciproke.

Dio benu ĉi tiun majestan renkonton, kaj virinoj atingu sian meritoplenan spacon en la socio, ĉar ĉio bona, kion ili apogas, fariĝas venko!


***José de Paiva Netto**, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Janeiro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Janeiro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Janeiro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Janeiro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Komento

Bob Felby - Semaphoe Park/SOUTH AUST Ĝuste tio, kion mi ĉiam pensas! Ni ĉiuj, virinoj kaj viroj, devas konsideri nin egalaj kaj kune provi eduki la novajn generaciojn, nome la infanojn, al la sama pensmaniero. Se ni vere deziras tutmondan pacon, ni ĉiuj devas fari ion por ebligi tion. Mi refoje gratulas Legion de Bona Volo pro ĝia grandioza laborego por efektiviĝi tiujn celojn de ni ĉiuj!!!

Talbott: Kosovo, Rusio kaj la mememo de Putin

Washington, 22 marto 2014 –



"La rusa prezidento, Vladimir Putin, ses fojojn referiĝis al la kazo de Kosovo, dum parolado lastatempe kvalifikante la sendependiĝon de Kosovo kiel anticipanto por la aneksado de Krimeo far Rusio. Ĉi tiuj du ekzemploj tute diferencas unu disde la alia" - diris la prezidanto de la Instituto Brookings, Strobe Talbott, en artikolo en la ĵurnalo Washington Post.

S-ro Talbott, eksa vic-sekretario de Ŝtato en la administracio de prezidento Klinton kiam NATO entreprenis sian aeron kampanjon kontraŭ la serbajn fortojn, 15 jarojn antaŭe, skribas ke la Alianco intervenis por haltigi la konflikton en Kosovo en la jaro 1999, ĉar la diplomatio disfalis kaj Miloŝeviĉ

komencis etnopurigan kaj mortigan kampanjon de la loĝantaro, raportas "La Voĉo de Ameriko".

"Tiu situacio havas nenion komunan kun Ukrainio", skribas li.

"Post la halto de la konflikto, pasis naŭ jaroj antaŭ ol Kosovo proklamu la sendependecon kaj tiu akto ne kondukis al la aneksiĝo far Albanio" akcentas Talbott.

La sola ligofadeno kiun la eksa alta oficialulo usona trovas inter la du situacioj estas la fobio kreita de Putin kaj Rusio al la politikoj de Okcidento kaj la misio de NATO kiu deflanke de Moskvo konsideriĝas minacanta al la nacia sekureco rusa.

Strobe Talbott memoras sian unuan renkontiĝon kun Vladimir Putin dum unu el la plej tensiigitaj periodoj en la interrilatoj Rusio- Okcidento post la fino de la Malvarma Milito. Mem s-ro Talbott troviĝis en Moskvo, en unu el la multaj diplomatiaj vojaĝoj je alta nivelo, por mildigi la tensiojn kun Moskvo, dum kiam Okcidento estis komencinta la kampanjon kontraŭ Miloŝeviĉ.

Dum la renkontiĝo li sin prezentas al la kapo de la Sekureca Konsilio de Kremlo, Vladimir Putin, nova oficiro, ambiciema,

en la unuaj rangoj de la kariero kondukanta lin estonte ĉekape de Kremlo.

La vizito envorte junio 1999, disvolviĝis en la tempo kiam rusoj estis minacintaj retiriĝi de la komunaj operacoj kun NATO kaj dislokigus siajn trupojn en Kosovo. Ene de malmulte da horoj, malgrandaj rusaj militistaj unuoj troviĝintaj en Bosnio por supervizii la plenumiĝon de la amnistio, eniris en Kosovon. NATO reagis sendante el Makedonio multnacion forton al Kosovo. La rusa operaco tuj suspendiĝis, sekvata de deklaracio far Ministerio de la Eksteraj aferoj de Rusio kie oni neis la incidenton.

La situacio kiel tion eksplikis la eksa usona oficialulo estis sufiĉe tikla kaj povus transformiĝi en danĝeran incidenton per fajroi interŝanĝo.

"Putin estis nedeĉifrebla kaj ege rezervema dum la renkontiĝo" memoras s-ro Talbott.

"Estas malfacile diri kian rolon li havis en tiu scenaro kiu preskaŭ kunfrontigis unu al la alia la trupojn de NATO kaj rusajn fortojn: en armitan batalon. Tio kion oni povas diri pri Putin estas la fakto ke li ne kaŝas sian plezuron sentantan

kiomfoje li havas la okazon elmontri sian forton kontraŭ
Okcidenton" skribas Strobe talbott en la ĵurnalo Washington
Post (r.m)

Beletraĵoj

Kritiko

La Ondo de Esperanto

Nr 3/2014

Kritikartikolo pri *La Sloganoj el Ŝtonoj*

Artikull kritik për *Parullat me gurë*

Terura libro. Eĉ je la unua vido. Rompo de normo. La longo 23.9 cm, la larĝo 17.1 cm. Evidenta fuŝo: oni prenis 0.1 cm de la longo por aldoni ĝin al la larĝo. Kiucele? Je la partia disciplino! Sendube por lezi la Unuecan Sistemon de Mezuroj. Bonega sistemo. Kaj mi, kiel partiano de glora partio de l' Presismo, tutsimple ne povas silenti, vidante tian arogaĵon. Des pli, ke nia frakcio de libra kovrilo opozicias al iu ajn reviziismo, eĉ ne temas pri ceteraj paĝoj de iu ajn libro.

Një libër i tmerrshëm. Qoftë edhe në shikim të parë. Një thyerje e normës. Gjatësia 23.9 cm, gjerësia 17.1 cm. Një punë e qartë shkel e shko: janë marrë 0.1 cm nga gjatësia për t'ja shtuar gjerësisë. Me ç'qëllim? Për disiplinën partiake! Padyshim për ta lënduar Sistemin Njësor të Masave. Një sistem shumë i mirë. Dhe unë, si anëtar i partisë së lavdishme të Shtypësizmit, thjesht nuk mund të hesht, duke parë këtë arogancë. Aq më tepër, që fraksioni ynë i kapakut të librit kundësrhton çdo lloj revizionizëm, madje nuk bëhet fjalë për faqet e tjera te cilido libër.

Unueco estas unueco. Sed kion ni povas vidi sur la paĝo 16? En la 4a linio "Li" estas tajpita tute korekte, sed la 41a kaj 42a literoj ĉi-liniaj estas tajpitaj kune! "La" sen spaceto interlitera. Terure! Terure ĝis animskuo!

Njësimësia është njësimësi. Por çfarë mund të shohim në faqen 16? Në rreshtin e katërt "Ai" është shkruar krejt saktë, por shkronjat e 41-ta dhe 42-ta të këtij rreshti janë shkruar sëbashku! Artikulli shqes "la" pa hapësirë ndërmjet shkronjave. Tmerr! Tmerr gjer në ngjethje mishi!

Ankaŭ la lastan linion en la lasta rakonto mi ne povas lasi sen komento, "super la v armega..." Mi havas nenion kontraŭ la fantazio de la aŭtoro, sed, unue, V devas esti granda. Due, konvene al la partia decido de Plenuma komitato de US de M kaj statistiko la armeo ricevos V- bombon nur en la 2073a jaro. Nur se psikopatoj de scienco...

Edhe rreshtin e fundit në tregimin e fundit nuk mund ta lë pa koment, " përmbi të n xehtën..." Nuk kam asgjë kundër fantazisë së autorit, por, së pari, N duhet të jetë e madhe. Së dyti, sipas vendimit partiak të komitetit Ekzekutiv të US (shkrimit universal) të M dhe statistikës ushtria do e marrë bombën N vetëm në vitin 2073. Vetëm në se psikopatët e shkencës...

Ĉio dirita estas nek ŝerco nek moko, des pli rikano. Mi simple uzis la algoritmon de la aŭturo. Bonan algoritmon. Krom la plej lasta rakonto kaj la plej lasta linio. Mistero, mistiko kaj enigma.. Mi mem estas eldonisto, mi mem estas kompostisto, mi subskribas permeson por multobligo. Pli ol dek personoj legas tekston antaŭ mia subskribo. Sed...sed...en mia lasta libreto, sur la lasta paĝo oni ĝis nun povas legi: "Karpo stufita kun karmo". Devas esti kukurbo".

Gjithçka u tha ŝeshtë shaka as tallje, aq më tepër qeshje me ligësi. Unë përdora thjesht algoritmin e autorit. Një logaritëm të mirë. Përveç tregimit të fundit dhe rreshtit të fundit. Mister, mistikë dhe enigmë. Jam vetë botues, jam faqosës, nënshkruaj lejen për shumëfishim. Më shumë se dhjetë vetë e lexojnë tekstin para nënshkrimit tim. Por...por...në libërthin tim të fundit, në

faqen e fundit mund të lexohet: " Krap i zier me pak ujë me krap". Duhet të jetë kungull.

La rakonto *La malgranda viro* estas al mi anime proksima, ĉar konstruita surbaze de simpla erareto. Rilate la enhavon. Ankaŭ mi iam estis vestita "pli malbone ol mizere". Sed kvankam mi estis nepo de kulako, mi neniam spertis humiligan traktadon pro tio, sed multon vidis. Ironio de l'sorto, en najbara duloĝeja domo vivis komunista funkciulo kaj "malamikoj de popolo", ekzilita Leningrada astrofizikisto Belen- Gajko. Li multon donis al mi, sed klarigi la esencon de la glacia malamikeco inter li kaj la najbaro li ne sukcesis, mi estis tre juna knabo. Sed nun, kiel atestanto, mi povas diri: La aŭtoro skribis el la animo, pura animo, eĉ sen unu falsa noto. Ankaŭ tradukistoj severe senigis min de la eblo iomete (sendube: bondezire) grumbli.

Tregimi *Burri i Vogël* është për mua shpirtërisht i afërt, sepse është ndërtuar mbi bazën e një gabimi të thjeshtë të vogël. Lidhur me përmbajtjen. Edhe unë kam qenë dikur i veshur "më keq se sa i mjehtë". Por ndonëse kam qenë nip kulaku, asnjëherë nuk kam provuar trajtim poshtërujes për këtë arsye, por kam parë shumë. Si ironi e fatit, në një ndërtesë me dy banesa jetonte një funksionar komunist dhe "një armik i popullit", i internuari- astrofizikani leningradas Belan-Gajko. Ai më ka dhënë shumë mua, por nuk arrita ta sqaroj thelbin e armiqësisë ndërmjet tij dhe fqinjit, isha djallë fort i ri. Kurse tani, si dëshmitar, mund të them: Autori ka shkruar me shpirt, me shpirt të pastër, madje pa asnjë shënim të rremë. Edhe përkthyesit ma kanë hequr mua ashpërsisht mundësinë për të llomotitur. (padyshim: me dëshirën e mirë).

Sed porko koton trovos. La Patrino finiĝas jene: "Fine mi trovis pravigon- kaj dormis kviete ĝis la vojaĝfino". Per sono, kiu trafis moralan kolizion, kiu sin trovas "en la situacio de la elekto inter malnobleco kaj honesteco" (Dorota Horodyska) kaj kiu faris paŝon, eĉ se mensan, al honesteco jam ne povas kviete ekdormi. Devas esti:

"..dormis ŝajne kviete...aŭ "kaj dormis kviete pro laco ĝis...". Elektro inter la bono kaj malbono, eĉ se momenta, konsumas multe, tro multe da energio. Mi ne tuŝas pure sciencan flankon de tiu fenomeno, sed volas citi la poeton Evtuŝenko. Mi ne arogas traduki poezie kaj do diras kiel povas: "Vivas ni sen pretigi al morto, /Kaj pro tio fariĝas senhontaj./ Sed sur ĉiu vojkruc' konscienco,/ Staras kvazaŭ Madon' nevidebla.../ Kaj se eĉ l' konscienc' tute mankas,/ Konscienciproĉ' plu en ni restas".

Por derri- baltĉen do gjeĵe. *Nĕna* mbaron si vijon: "Mĕ nĕ fund e gjeta justifikimin- dhe fjeta qetĕ deri nĕ fund tĕ udhĕtimit". Me nĕj tingull, qĕ qĕlloi pĕrplasjen morale, qĕ gjendet "nĕ situatĕn e zgjedhjes ndĕrmjet mosfis nikĕrisĕ dhe ndershmĕrisĕ" (Dorota Horodyska) dhe kush ka bĕrĕ nĕj hap, qoftĕ edhe mendor, drejt ndershmĕrisĕ, tashmĕ nuk mund tĕ flejĕ i qetĕ. Duhet tĕ jetĕ: "fjeti mbase qetĕ, apo dhe fjeti qetĕ nga lodhja gjer.." Zgjedhja ndĕrmjet tĕ mirĕs dhe tĕ keqes, ndonĕse e momentit, konsumon shumĕ, jashtĕzakonisht shumĕ energji. Unĕ nuk e prek anĕn e pastĕr shkencore tĕ atij fenomeni, por dua tĕ citoj poetin Jevtushenko. Nuk bĕj arogantin tĕ pĕrkthej nĕ poezi, pra po e them si mundem: "Jetojmĕ pa u pĕrgatitur pĕr vdekjen/ Prandaj bĕhemi tĕ paturpsĕm/ Por nĕ ĉdo udhĕkryq tĕ ndĕrgjegjes/ Qendroj sikur nĕj Madonĕ e padukshme/ Dhe se edhe ndĕrgjegjĕja mungon / Tek ne mbetet ende vvarja e ndĕrgjegjegjies/.

Ĝuste la momento de elektro ŝaltas turmentajn rimorsojn. Se ne konscie, do subkonscie, dum dormo. Honesta persono ne povas esti eksa, se povas esti eksa, do nur surfaĉe. Ĉu la aŭtoro volas tion aŭ ne, sed aĉulojn el liaj rakontoj ronĝas, doloras la konscienco. Kaj tio estas justa. Samkiel mia lasta kroĉo al iu partizano, kiu verkis la postparolon, sed ne subskribis ĝin. Do, mi citas: "Li invitas samtempe al la disputo kun aliaj homoj, al la "interŝanĝo" de eŭropaj "spertoj". Jen la vortoj por la oreloj de Dio. Sed kial nur eŭropaj "spertoj"? Sed Aŭstralio? Vjetnamio? Ĉinio kun ĝia kultura

revolucio? Norda Koreio kun ĝia bizara vivo? Estas pli bone, se tiuj "spertoj" tute ne ekzistus. Sed...

VikS

Pikërisht momenti i zgjedhjes ndez brerjet torturuese të ndërgjegjes. Në se jo me vetëdije, pra me nënvetëdije, gjatë gjumit. Një person i ndershëm nuk mund të jetë një ish, në se mund të ishte ish, pra vetëm në sipërfaqe. Do apo nuk do vallë autori, por të këqinjët e tregimeve të tij brehen, u dhëmb ndërgjegjia. Dhe kjo është e drejtë. Po ashtu sikurse ngecja ime te një partizan, që shkroi pasthënien, por nuk e nënshkroi atë. Pra, citoj: " Ai na fton njëkohësisht në diskutimin me nje rëz të tjerë, në "shkëmbim" "përvojash evropiane. Ja fjalët për veshët e Zotit. Po pse "përvojat" evropiane? Po Australia? Vjetnami? Kina me revolucionin e vet kulturor? Koreja e Veriut me jetën e saj me fekte të çuditshme? Është më mirë, në se ato "përvoja" nuk do ekzistonin. Por..

VikS

Libroj niaj en Francio

Malkovru novan literaturan serion Literaturaj trezoroj de nuntempaj aŭtoroj el orienteŭropaj ŝtatoj
--

Iniciatis tiun novan serion da tradukoj al Esperanto nia pola samideano Tomasz CHMIELIK. Ĝi celas konigon de nuntempaj aŭtoroj de orienteŭropaj landoj. Kelkaj inter ili jam verkis dum la komunista periodo kaj pluverkas nun, aliaj ekverkis post la politikaj ŝanĝoj. Vi malkovros en Esperanto aŭtorojn el Albanio, Pollando kaj plej baldaŭ el Kosovo kaj Kroatio. Plejmulto inter tiuj ĉi aŭtoroj favore reagis, kiam ili estis kontaktitaj kaj permesis presadon en Esperanto kontraŭ malaltaj aŭtorrajtoj, aŭ ili eĉ petis neniun sumon. Iuj eĉ pagis la eldonon ! Krome helpis kelkaj sponsoroj.

La rezulto estas, ke dank'al nia libroservo vi povos akiri tiujn ĉi verkojn je ege malalta kosto. Ne hezitu trafolumi kaj akiri tiujn ĉi verkojn, kiuj malfermos al vi landojn longtempe malbone konitaj.

E.L.

Albanio :

Hunda haŭto Romano de Fatos Kongoli 8 €

La sloganoj el ŝtonoj Rakontaro de Ylljet Aliĉka 10 €

Lundo en sep tagoj (Poemaro de Luljeta Lleshanaku) 9 €

[KAVALIRO EN TIGRA FELO](#)

PROLOGO

1.

Kiu kreis universon per potenca ĉiopovo,
Tiu de ĉiel' animis la estaĵojn per la blovo,
Al ni, homoj li donacis variecon de terglobo,
Kaj devenis de li reĝoj laŭ similo kaj la volo.

2.

Ho, unika plejaltulo, aĵojn faris via mano,
Helpu min potenco via piedpremi la satanon,
Donu al mi la ĝismortan, de miĝnuroj^o ardan flamon,
Malpezigu terajn pekojn dum la horo de kondamno.

3.

La leono de Tamari^{oo} dece portas ŝildon, glavon,
De reĝino sunvizaĝa, kiu havas nigrajn harojn,
Mi kuraĝas ilin glori, esprimante grandan raven,
Sentas ĉiu la dolĉecon, kiu vidas tiun paron.

4.

Ni glorkantu la reĝinon per varmegaj sangaj larmoj,

Jam pli frue mi sin gloris per ekstazaj ditiramboj.
Mi per skribo uzis kanon, inkon el okulaj lagoj,
Koron de la aŭskultanto pro amego piku glavo.

° Miĝnuro – suferanta enamiĝinto (arabe).

°° Rustaveli subkomprenas edzon de reĝino Tamari – David - on

5.

Oni donis al mi taskon – verki belsonontajn strofojn,
Pri beleco de okuloj, okulharoj, nigraj blovoj,
Badaĥŝanaj[°] rozaj lipoj, kristaldentoj, ĉarma kolo,
Sur amboso plumba, mola ja rompiĝis eĉ la ŝtono.

6.

Mi bezonas mian vorton, koron arton nun apliki,
Dio donu al mi forton kaj racion utiligi,
Ja pri Tariel^{°°} en versoj indas tutan veron diri,
Kaj pri tri herooj, kiuj kunbatalis kaj amikis.

7.

Ni kunvenu kaj sidiĝu, verŝu malsekigajn larmojn,
Tariel – similan homon ĉu jam vidis la homaro?
Rustaveli – mi eksidis kun korvundo, ama fajro,
Kaj versigis la rakonton, kiel brilan juvelaron.

8.

Mi - poeto Rustaveli, faris tion en torturo,
Ŝin^{°°°} obeas regimentoj, por ŝi estas mi mortulo,
Mi nenie trovis helpon, kuracilon, proksimulon,
Vi mortigu min aŭ donu resanigon al miĝnuro.

9.

Jen elektis mi la persan historion por la temo,
Kartveligis ĝin kaj faris tre ŝatatan mi aferon,
En versaĵon transformigis, kreis belan mi poemon,
Ĝin transdonu homaj manoj kiel admirindan ĝemon.

° Badaĥŝan – loko en Pamiro, kie oni elterigas rubenojn.

°° Tariel – heroo de “Kavaliro en tigra felo”. (En la poemo propraj nomoj estas uzataj sen apostrofoj kaj leganto devas akcenti sur la

lasta vokalo: Tarie'l, Rosteva'n, Dareĝa'n, Parsada'n, Avtandi'l,
Tinatin kaj t.p.).

°° Rustaveli subkomprenas reĝino Tamari.

10.

Ŝi blindigis min – poeton, sed mi revis pri l'reĝino,
Enamiĝis mi kaj tial migras tra la mond' sen fino,
Forbruligu ĝi la korpon, nur ekĝoju la animo,
Tri herooj kante gloros mi en panegiraj rimoj.

11.

Ĉiu devas kontentiĝi, kion donas la kreinto –
Laborulo pri laboro, batalanto pri milito.
La miĝnur' ekkonas amon, kvankam restas turmentito,
Al neniu li malmalhelpu kaj ne kaŭzu do aflikton.

12.

De komenco poezio estas parto de la scio,
Ĝi ekzistas por legantoj, diajn ferojn faras dio,
Ŝatas ĝin prudenta homo, kiu volas scii ion.
Parolado longa kurtas – jen valor' de poezio.

13.

Ekzameno por ĉevalo estas longa galopado,
Sur areno oni vidas kiel lertas pilkludanto,
Ankaŭ la poeto estas rekonebla en verkado,
Sed la vortoj ne sifiĉas – verso estas turmentado.

14.

Ĉu dubinda poetaĉo povas verki kaj ŝairi?°
Kartvellingvon li ne scias kaj la verŝ ne povas iri.
Ĉu multvorta babilulo povas ion taŭgan diri?
Ĉu li frapas per ĉogano°° brave, ke nur indas miri?

15.

Ĉu jam estas la poeto, kiu du-tri versojn rimas?
Lin la homoj ne agnoskas kaj leganto ne estimas,
Kvankam tia poetaĉo kun aplombo laute krias:
“Mia verso – la plej bona ” – kiel mulo li obstinas.

° ŝairi – verki ŝairon. (ŝairo – 16 silaba verso).

°° ĉogano – longa bastono, kun kiu oni pilkludis sur ĉevaloj.

16.

Due, estas fuŝpoetoj, kiuj kreas sensencaĵojn,
Ne kapablas ili verki emociajn do versaĵojn,
Malsukcese ili skribas, faras ĉiam la stultaĵojn,
Ne mortigas ili beston – nur malgrandan do ĉasaĵon.

17.

Tria spec' de poezio por kantado ege bonas,
Dum festeno kun fidalaj kamaradoj ĝi imponas,
Kaj plezuron, bonhumoron al la aŭskultantoj donas,
Nur venkinton de poemo granda ni poeto nomas.

18.

Do poeto la talenton devas ne elspezi vane,
Unusolan belulinon li adoras arde, ame,
Nur pri ŝi li devas verki, glori, laŭdi ŝin konstante,
Kaj por ŝi parolo lia sonas ĉiam dolĉe, kante.

19.

Nun vi scias, kiun arde mi en la poemo gloras,
Por mi estas la honoro, ŝin prikanti mi ne hontas,
Si por mi tigrino estas, vane mi ne fanfaronas,
Kaj per versoj de l' poemo la reĝinon mi honoras.

20.

Diros mi, ke vera amo estas sento altspirita.
Malfacile esprimebla, nur por moblaj destinita.
Ĝi al ni flugilojn donas, por ĉielo ĝi kreita,
Kiu volas ĝin ekkoni, estu ja la amo inda.

21.

Tian amon ne komprenas homa saĝo kaj genio,
Ĉar laciĝas niaj sensoj kaj samtempe la racio.
Mi ĉi tie gloras amon, teran senton kaj pasion,
Ne malĉaston, ne fiaĵon – fortan homan afekcion.

22.

"Amo estas franezaĵo" – la araba saĝo diras,
Ĉar miĝnuro nevidante amatinon, freneziĝas.

Malespero tiam unujn al pieco forte ligas,
Sed aliaj kun virinoj amindumi nur deziras.

23.

Do miĝnuro devas esti tiel bela kiel suno,
Saĝa, riĉa, bona, juna, ŝia paro – egalulo,
Devas li necese venki kontraŭulon en la lukto;
Ne havante ĉion tion, li ne estas la miĝnuro.

24.

Vera amo – bela speco, ĉielalta la ĝuado,
Estas ĝi nekomparebla kun malĉasto, delogado,
Do ne miksas la saĝuloj ĝin kun distro kun konatoj,
Kredu vi al mi – poeto, ĝusta estas parolado.

25.

La miĝnuro devas esti pura, noble de deveno,
Se disiĝas de virino, havu en la koro splenon;
Lin – konstantan kaj fidelan, plibeligas nur plorĝemo.
Mi malŝatas ŝmacajn kisojn kaj senkorajn ĉirkaŭprenojn.

26.

Kaj ne donu nomon "amo" al ŝajniga koketado,
Kiam ŝanĝas ĉiutege la objekto de la amo,
Tiel ofte en la vivo ludas vanta junularo;
La miĝnur' nur tiu estas, kiu venkas delogadon.

27.

Plena de misteroj diaj devas esti vera amo,
Oni ĝin ne rajtas tuŝi per malmilda, kruda mano,
La miĝnuro do suferas, sole vagas en kamparo,
Eĉ se amatin' koleras, li konservas sian ravon.

28.

Li ne devas al la homoj montri sian ekzaltiĝon
Kaj ne povas ĝemi, krei por la homa amasiĝo.
Li nur devas kaŝi amon – ne elmontri al publiko,
La sufero pro la amo al li ŝajnu nur feliĉo.

29.

Kiu diras amsekretan, ĉu konfidon li meritas?
Tia home sian propran senton tute neniigas,

Li kaj ŝi eksentas honton, se sekreto disvastiĝas,
Kaj ĉu sian amatinon tiel dolorigi indas?

30.

Miras mi, se la amanto pri la amo nur babilas,
Se ne amas – malastimas, tio vere ĝin signifas.

Li per vane babilado sian celon ne atingas,

Fia homo fian vorton kun plezuro ĉiam diras.

31.

Se miĝnuro pro la amo kun la larmoj multe plores,

Tio ĉi signifas vere – li amanto esti povas,

Kaj interne en la koro nur vizaĝo ŝia floras,

Tamen estas ja pli bone, se li amon ne elmontras.

RAKONTO PRI ARABA REĜO ROSTEVAN-O

32.

Vivis en araba lando saĝa reĝo Rostevan-o,

Dio benis feliĉulon, kiu estis ne tirano,

Elokventa kaj bonkora, malestimis reĝ' gloramon,

Multenombrajn trupojn havis kaj li mem, la fortan manon.

33.

Li edukis nur filinon, unusolan, veran ĉarmon,

Estis ŝi la lumigilo – suno inter astra svarmo.

Kiu vidis ŝin – tuj perdis la trankvilon kaj la kapon,

Por ŝin glori la saĝuloj devis havi parolarton.

34.

Tinatin – baptnomo ŝia, estis suna virgulino;

Ne trovita estis edzo por la juna belulino.

Rostevan ne havis filon kaj li pensis: “La virino

Povas esti, kiel viro, ŝtata homo kaj reĝino”.

35.

Rostevan vezirojn vokas kaj al ili tiel plendas:

“Tago mia jam foriras, do la nokto min kunprenas,

Kiam rozo forvelkinta en ĝardeno plu ne belas,

Baldaŭ sur la sama branĉo nova floro reaperas”.

36.

“Do mi mortos proksimtempe, maljuneco min jam venkas;

Ja ne estas tio lumo, se obskuro ĝin malhelpas;
Tinatin – filino mia, leĝe tronon ŝi heredas;
Kroni ŝin, mi, patro, volas, ĉar ŝi sunon eĉ neglektas”.

37.

La veziroj al li diris jenan flatan komplimenton:
“Frue estas, reĝa moŝto, lasi jam la testamenton;
Kvankam velkas bela rozo, ni ne sentu malkontenton;
Ĉu superi povas lunon astro sur la firmamento?”

38.

“Dume en ĝardeno via freŝaj rozoj bonodoras;
Eĉ severa opinio via por ni ĉiam bonas,
Kaj se vi decidis tiel, estu, kiel vi ordonas:
Estas bona la reĝino, kiu sunon samvaloras”.

39.

“Kvankam estas ŝi virino – la devenon havas dian,
Ŝi scipovas la regadon en araba lando nia,
Kiel suno brilas faroj kune kun saĝeco ŝia,
La geidoj de leonoj egalrajtaj estas ĉiam”.

40. Avtandil – spaspeto^o estis fil’ de amirspasalaro^{oo},
Svelta kiel la cipreso, bela kiel la stelaro.

Sed al li ankoraŭ mankis sur vizaĝo la hararo;
Amis li la reĝidinon, ŝiajn ravajn okulharojn.

41.

Li suferis tre sekrete, sed li kaŝis amo – flamon;
Dum foresto ŝia palis de junulo rozaj vangoj,
Post revido tiuj vangoj rericevis sian sangon;
Pro turmentoj de la koro kompatinda estas amo.

42.

La kronadon de l’ filino poste Rostevan intencis,
Avtandil ekĝojis multe, revi pri reĝin’ komencis,
“Mi nun vidis ŝin pli ofte,” la junulo tiam pensis,
“Trovos mi la kuracilon, por sopiron mian venki”.

^o spaspeto – ĉefo de militistaro.

^{oo} amirspasalaro – milita estro kaj ĉefo de armeo.

43.

Poste Rostevan deklaris, ke la trono estas ŝia,
“Mia Tinatin heredos oran kronon arabian,
Kaj anstataŭinte sunon ŝi radios brilon sian,
Venu ĉiuj, venu vidi la reĝinon saĝan vian”.

44.

Kaj kunvenis la araboj, granda nombro de la ĥasoj^o,
Avtandil antaŭe iris – ĉefo de militistaroj,
Sekvis lin veziro Sograt, la gvidant’ de nobelaro;
Pri ortrono oni diris: “Jen, la plej valora aĵo”.

45.

Kaj la reĝo la filinon akompanis ĝojoplena,
Ŝin sidigis sur la tronon, ŝi silentis obeema,
Multekostan sceptron prenis kun rubeno lumludema,
Kapon de la belulino ekornamis krono gema.

46.

Retiriĝis ĉiuj kune, riverence ŝin adoris,
Benis reĝo la filinon, ĉiu la reĝinon gloris,
La muzikaj instrumentoj – flut-cimbaloj tie sonis,
La reĝino klinis kapon kaj ŝi kaŝe multe ploris.

47.

Ploris tial ĉar ne estis la reĝino konvinkita,
Ke la tronon de la patro ŝi heredi jam meritas,
Tamen al ŝi sin turninte Rostevan kontenta diras:
“Nun filino, mi – la patro, de hodiaŭ trankviliĝas”.

48.

Li riproĉas al filino: “Via plor’ al mi ne plaĉas,
Ekde nun araba lando novan monarkinon havas,
Vi jam estas regantino, la popolo vin jam ŝatas,
Saĝe solvu ŝtataferojn, la justecon ĉiu amas”.

^o ĥaso - proksimulo de la reĝo, kortegano.

49.

Por la rozoj kaj herbaĉoj sun’ egale lumi povas,
Por la grandaj kaj malgrandaj esti bona dio volas,

Malvaro senvirtulon forte ligas kaj imponas,
Malvaru, eĉ la maro akvon prenas kaj redonas”.

50.

“La boneco por la reĝoj kiel ornamaĵo estas,
Same kiel la cipreso svelta en edeno kreskas,
Perfidulon la bonkora malvaru ĉiam venkas,
Fordonita restas via, kion vi konservas – perdas”.

51.

La instruon de la patro ŝi aŭskultis ĝis la fino
Kaj komprenis ĉion bone, obeema la filino.
Reĝo drinkis, multe ĝojis – la festeno en kulmino;
Tinatin malplaĉis sunon – sun’ imitis Tinatin-on.

52.

Ŝi alvokis edukiston – la fidelan protektanton,
Kaj ordonis trezorejon alportigi per servantoj,
“Metu ĝin ĉi tien, ĉar ĝi havas jam la posedanton”.

Kaj senlime ŝi disdonis oron kaj la diamanton.

53.

La reĝino disdonadis ĉion, kion ŝi jam havis,
La riĉaĵoj de l’ kortego eĉ al malriĉuloj trafis,
Poste diris la reĝino: “La trezoron mi ne ŝparis,
Laŭ konsilo de la patro ĉion obeeme faris”.

54.

Kaj krom tio, ŝi ordonis: “Vi malfermu trezorkestojn,
Plenigintajn per la perloj, diamantoj, ormoneroj;
Amilaĥor^o, vi alpelu de ĉevaloj multajn gregojn”.
Kaj alportis trezoristoj valoraĵojn el la keloj.

^o amilaĥor’ - ĉefo de ĉevalistoj ĉe kortego.

55.

Ŝi disdonis oron kvazaŭ estus ĝi rabaĵo turka,
Ankaŭ la arabĉevalojn de koloro nigra, bruna;
Estis ŝia bonkoreco neĝa uragan’ abunda,
Do forgesis ŝi neniun, ĉiu diris dankon multan.

56.

La unua tag' forpasis, ĉiuj drinkis, sin regalis,
Militistoj kaj nobeloj multajn tostojn ĉi proklamis,
Malgajiĝis nur la reĝo, ian li malĝojon havis,
Kaj ekflustris tiam gastoj: "Kio do al li okazis?"

57.

Avtandil ĉe tablo sidis, li – leono, lerta tigro,
La spaspeto de armeo, li alvokis nur admiron,
Kaj Sograt apude sidis – maljunulo kaj veziro,
Ambaŭ pri la reĝo diris: "Havas li ĉagreno-signon".

58.

"Ŝajne reĝo havas plagon, io lin tre maltrankvilas,
Sed ĉu ebla estas tio, ja ĉi tie suno brilas",
Diris Avtandil: "Ni scias, kial reĝo kapon klinas,
Kvazaŭ ŝerce ni demandu, kial gaje li ne ridas".

59.

Avtandil, Sograt ekstaris, al la reĝo proksimiĝis,
La kalikon por trinkaĵo propramane li plenigis,
Trankviligi reĝon volis, bonhumoris kaj ekridis,
La veziro tamen ŝercis, gajan vorton li aldiris:

60.

"Kial estas vi malĝoja, kial havas vi angoron?
Vere perdis vi kortegan valoraĵon kaj trezoron,
Ĉion la filin' bonkora jam disdonis al popolo,
Por vi estus ja pli bone ne sidigi ŝin sur tronon".

61.

Kiam reĝo paroladon de l' veziro finaŭskultis,
Estis li tre mirigita: "Kun ĉi vortoj vi trouzis,
Vi vezir' – servanto mia, kiu diris, ke mi stultis,
Kaj ĉu povus iu iam pri avaro min akuzi?"

62.

"Ne pri tio mi ĉagrenas, jen alia tragedio,
Kaŭzo, ke mi maljuniĝis – proksimiĝas jam la fino,
Malfacilas en la regno trovi tian bravan viron,
Kiu povas plidaŭrigi kavaliran tradicion?"

63.

“Do mi havas nur filinon – dio ne donacis filon,
La virino estas ino, ŝi nur penas fari ion,
En juneco mi pilkludis – estis ĉiam la venkinto,
Eble Avtandil similas, mia juna edukito”.

64.

Al paroloj de la reĝo Avtandil ridetis kore,
Li mallevis sian kapon kaj aŭskultis laŭdon vole,
Brilis liaj blankaj dentoj memkontente kaj petole,
Rostevan demandis: “Kial vi ridetas nun fripone?”

65.

Avtandil aŭdacis fine kaj respondis kun respekto:
“Donu al mi la farmanon^o kaj atentu argumenton,
Ke vasalon vi aŭskultos kiel patro, kun prudento,
Ne koleros kaj ne punos pro ne deca elokvento”.

^ofarmano – ordono de irana ŝaĥo aŭ de turka sultano

66.

Je filino ĵuras reĝo – ne koleros kiel patro,
Avtandil komencis poste: "Nun mi diras sen singardo:
Ne tre taŭgas fanfaroni pri la pafarkista arto,
Pli konvenas modesteco al la vana parolado".

67.

“Avtandil – mi, polvo via, estas juna kaj spaspeto,
Mi kun vi konkuri volus sur la kamp^o, sen pardonpeto,
Ni alvoku niajn trupojn por la ĝusta pri atesto,
Ili nomos la venkinton, kiu ĉasos pli da bestoj”.

68.

Rostevan denove diras: “Mi ne estas la profeto,
Sed konkuri kun vi volas, mi sentas fari veton.
La plej spertajn militistojn ni invitos por atesto;
Kampo montrós, kiu venkos – mi oldulo aŭ spaspeto”.

69.

“Malvenkito de l’konkuro sen kapvesto dum tri tagoj
Devos ĉie promenadi”. Finis reĝo sian blagon.

La sekvantan tagon ili planis iri al ĉasado,
Gastoj ridis, estis gajaj, sklavoj prenis multajn sagojn.
70.

"Estu por ĉasado pretaj!" – reĝo kriis al la sklavoj,
"Iru peli la ĉasistojn, venu ĉiuj kun pafarkoj".
Li invitis kunĉasistojn en arbaroj kaj sur kampoj,
Do finiĝis la festeno, kie kantis oni kantojn.

LA ĈASADO DE ROSTEVAN KUN AVTANDIL
71.

Svelta liliflor' spaspeto matenfrue galopvenis,
Li – rubena kristalvitro en purpuro sin belvestis,
Orteksaĵa pelerino por jinulo tre konvenis,
Ekridetis kavaliro kaj ĉasadon eki petis.
72.

Sin ekipis la monarko kaj sidiĝis sur ĉevalon,
Ĉeno de la trupoj liaj ĉirkauigis verdan valon,
Regis tie festa bruo, kiel apud akvofalo,
Kaj konkuris dum ĉasado la rivalo kun rivalo.
73.

Reĝo vokas dek du sklavojn – la fidelajn kunĉasantojn:
"Sklavoj, portu por ĉasado streĉajn arkojn, akrajn sagojn,
Vi kalkulu niajn pafojn kaj komparu ĝustajn trafojn,
Mortigitajn bestojn metu por kalkuli en la arojn".
74.

Estis granda sangverŝado, kuris ĉiaj animaloj,
La onagroj, cervoj, kaproj kaj malicaj leopardoj,
Mortigitaj ili estas per rapidaj, akraj sagoj,
Jen pafarko de l' ĉasisto, Jen senlacaĵ liaj manoj.
75.

Polvo de ĉevalaj hufoj sunan lumon preskaŭ kaŝis,
Sango de la bestoj fluis, ĉar ĉasistoj lerte trafis,
Avtandil kaj reĝo ambaŭ evidente bone ĉasis,
Kaj vunditaj animaloj nun forkuri ne kuraĝis.
76.

Ili gregoj persekutis, multajn kampojn tragalopis;
Ankaŭ dio mem tro grandan sangveŝadon malprobis.

Ĉie herbo en ĉasejo pro la sango ruĝkoloris,
Avtandil-on observantoj pro sukceso laŭde gloris.

77.

Kaj ĉasistoj jam trarajdis ĝis la fino verdajn kampojn,
Jen rivero inter rokoj, al ĉielo flugis faltoj,
Ĉiu besto jam sin kaŝis en densejoj kaj arbaroj;
Kvankam lacaj homoj montris bonhumoron per aklamoj.

78.

Avtandil kaj Rostevan ĉi kune estis, multe ridis,
“Mi – gajninto”, ĉiu diris, kvankam veron eĉ ne sciis,
“Nun kalkulu, kian nombron ĉiu el ni du mortigis”.

Al servistoj kaj aliaj atestantoj reĝo diris.

79.

“Ni sincere diras, reĝo, ne mensogas viaj sklavoj,
Ni ne volas vin ofendi, sangoriĉa estas tago,
Avtandil ja pli sukcesis, bone trafis liaj sagoj,
Estis ĝojo por ĉasisto, por la bestoj granda plago”.

80.

“Kune vi mortigis aron el centoble dudek bestoj,
Avtandil vin ĉi superis je dudekoj da aferoj.
La mistrafojn ni ne vidis, liaj sagoj trafis celojn,
Viaj sagoj iam estis enpikitaj en la teron”.

81. Avtandil-on laŭdis ĉiuj – feliĉigis Rostevan-on,
Kiu sentis raven kvazaŭ post sukcesa ĵet^o de nardoj,
Ĉar li amis edukiton, kiel rozon najtingalo,
Kvankam li malgajnis veton, li ridetis al rivalo.

^o nardoj – orientlanda ludo kun ĵetkuboj.

82.

Kaj eksidis ili ambaŭ en la arba freŝa ombro,
Estis lacaj kaj ne povis elparoli eĉ la vorton,
Dek du sklavoj – la plej bravaj, staris antaŭ la sinjoro,
Do ripozis la ĉasistoj ĉe arbaro, apud fonto.

PRI TIO, KIEL ARABREĜO EKVIDIS TIGROFELULON

83.

Ĉe la font' sidanta ploris iu bela aliulo,

Rajdĉevalon nigran tenis je rimeno li – fortulo.
Perloj dense kovris selon kaj ĉevalon de l'solulo,
Liaj vangoj palis prujne, gutis larmoj el okuloj.
84.

Tiu estis kavaliro, alta, svelta, kiel kano,
Li – en tigra fel' vestita havis tigrofelan ĉapon,
Tenis li grandegan skurĝon, dikan kiel lia mano,
Lin proksime volis vidi de ĉasistoj karavano.
85.

Kaj sendita estis sklavo por rekoni nekonaton,
Kiam li alproksimiĝis, tute perdis parolarton,
Kristalvitra pluvo falis teren apud la ploranto,
Eĉ la vorton ne respondis la junul' al demandanto.
86.

Pro timego la sendito ne kuraĝis ion diri,
Li rigardis kavaliron, iomete trankviliĝis,
Poste diris li mallaŭte: "Reĝo vin deziras vidi",
La fremdulo tamen mutis, lia ploro koron ŝiris.
87.

La ploranto ne ekaŭdis nek ekvidis la senditon,
Ne rimarkis li bruegon, nek fanfarojn de ĉasistoj,
Ĉar bruligis flamo koron de la juna turmentito,
Sangajn larmojn kaj ĝemadon kaŭzis granda malkonfido.
88.

Liaj revoj, liaj pensoj vagis en alia lando;
Ripetita estis peto, sed ne ĉesis la ploradon,
Ne atentis kavaliro pri la vortoj de la sklavo
Kaj ne malfermiĝis lipoj – tiuj ruĝaj rozpetaloj.
89.

La sendito sen respondo al la reĝo fine venis:
"Li ne volas nin ekkoni, mi nur tiel lin komprenis;
Li blindigis kiel suno, mi vidinta preskaŭ svenis.
li ne aŭdis vian peton kaj respondi li ne emis".
90.

Ofendita kaj kolera Rostevan esprimis miron;
Dek du sklavojn li venigis kaj ordonis sen hezito:

"Iru tuj al la strangulo, prenu kune la armilon,
Kiu ajn li estus – urĝe alkonduku tiun viron".

91.

La armitaj pafarkistoj proksimiĝis al la viro,
Nun ekvidis realecon la ploranta kavaliro,
Li ĉirkaŭrigardis fine kaj rimarkis militistojn,
Kriis "Ho - ve" solan vorton, eĉ ne prenis tranĉarmilon.

92.

Kavaliro viŝis larmojn, prenis siajn glavon, sagon
Kaj eksidis sur ĉevalon ne aŭskultis paroladon,
Tenis ĉevalkondukilojn per fortegaj siaj manoj,
Kaj subite forgalopis de armitaj arabsklavoj.

93.

Lin la sklavoj vokis kapti, la aŭdacan kavaliron,
Sed al ili jen okazis granda plago, aĉa fino:
Li iliajn brustojn sekcis per la forta leda vipo,
Kapon al la kap' kunpuŝis de la povraj turmentitoj.

94.

Rostevan ekfuriozis, lin ekkapti vivan volis,
Sed portanto de fel' tigra batalinte forgalopis,
Homon sur la homo puŝis, kun neniuj ekparolis,
Vane Rostevan – la reĝo, persekuti lin ordonis.

95.

Ambaŭ – Avtandil kaj reĝo – sur ĉevalojn tuj eksidis,
Lin postrajdi kaj atingi la rajdantoj tre deziris,
Sed ĉeval' de nekonato kavazaŭ nevidebla iĝis,
Tamen tiu, kiu fuĝis, persekuton bone vidis.

96.

Skurĝis li ĉevalon sian kaj forrajdi tre rapidis,
Malaperis tuj la viro, kaj neniuj lin plu vidis,
Eble li ĉielon flugis aŭ abismo lin entiris,
Estis vero – la rajdanto eĉ la spuron ne restigis.

97.

Ili serĉis liajn spurojn kaj nenie ilin trovis,
Miris ĉiu: "Tiu Devo kiel malaperi povis".

La mortintoj tie kuŝis, la vunditoj ĝeme ploris,
Kaj la reĝo gajan feston ne daŭrigi tuj ordonis.
98.

Diris li: "Por mi, verŝajne jam finiĝis di-favoro,
Ĉar la gaja fest' fariĝis nur malĝojo kaj doloro,
Kuracisto ne kuracos mian vundon en la koro,
Estu laŭ la dia volo, kaj al dio sola gloro".
99.

Kaj al hejmo sin direktis de ĉasad' la maljunulo,
Ĉiu sklavo, militistoj, siajn lasis jam okupojn,
Ĉiuj metis la armilojn, ĉagreniĝis eĉ la trupoj,
Kelkaj diris: "Reĝo pravas, tio estas dia puno".
100.

Reĝ' malgaje hejmen venis, perdis ĝojon kaj esperon,
Avtandil – la edukito, ĉe li restis ĉi vesperon,
Kaj foriris de kortego la veziroj, kurieroj,
Ĉangon jam neniu ludis, ĉie regis la sufero.

Fatos Kongoli

Rakontoj

Atendante Nostradamuson

Tirana 2007



Anstataŭ la enkonduko

Eŭropeca sonĝo inter Al Paĉino kaj Kavabata

Se ni akceptus ke la titolo esprimas la ideon de la verkaĵo, mi devas konfesi miaflanke ke sojle de la eŭropeca vojaĝo sud-norden mi

havis nenian ideon enkapo, des malpli ion rilatanta al Al Paĉino kaj Kavabata. Mi ne sciis ankaŭ alion: en mia kazo la vojaĝo ne estus simple translokiĝo en la spaco. Baldaŭ ĝi elturniĝus en translokiĝon en la tempo, je kontraŭa direkto de la fluo. Kaj estas absurde la situacio kiam vi pensas ke estas flugante al la futuro, dum, envere, vi sentiĝas alkraciita far la pasinto. Mi komprenas, ĉi tio estas trista, eĉ danĝera, sed por la homo estas malfacile eskapi el si mem. Tial mi petas permeson por fari tri parenteojn. Ili povas esti tute envanaj kaj mi bedaŭrus se oni pasigus ilin, ne leginte. Finfine ili estas ja vico de paradoksoj.

1.

Du pasintajn jarojn, mian partoprenon en la Trajno de la Beletro 2000 mi eksciis en cirkonstancoj iel surrealismaj. Unuafoje mi estis ricevinta invitleteron el la ambasadejo de Irano kaj mi hezitis iri pro banala kialo: mi estis eliginta preskaŭ ĉiujn dentojn. Restis kvar lastaj dentoj, supre, sed iel ajn, ĝis mi eligus ankaŭ ilin, ĉi lastaj servus min kiel montrofenestron, mi aspektis sendenta, sufiĉus ke mi ne ridu. Amiko, mia diplomato, bonaŭguro. Mi apenaŭ komprenis la kialon de la bonaŭguro. La ĉefurbaj ĵurnaloj sciigis la partoprenon de triopo de albanaj verkistoj en fantastika vojaĝo per trajno. La ĵurnalojn mi ne legis delonge kaj mi kaptiĝis en surprizo. Ŝajnis min tio nekredbla. Kaj mi susuris al si: "Dio mia, kial tiel malfrue?"

Post jaro, mi sciigis ke mi estis invitita en Parizo okaze de oficiala promovigo de la aktiveco kaj ĉi tie estas la loko por la unua parentezo. Tio ne rilatas al Parizo, nek al la eŭropeca aventuro de la Trajno. Ĝi entenas ion propran kaj oni povas juĝi tion ne konvene, tiom kiel la eligo de la dentoj kaj ties anstataŭiĝo per protezo, iel ajn, korektus notinde mian aspekton, aparte kiam mi ridis kaj malkovris kelkajn degraditajn dentojn, kaj ĉiuj scias ke mi apenaŭ povas resti senride ankaŭ kiam envere mi emas plori.

Tiel, ankaŭ tiujn tagojn en Parizo, mi emis plori. Idiotece. Mia filino ĵus estis foriĝinta kiel ekonomian elmigranton en Usonon, en Nov-Jorkon, kaj min ŝajnis ke kelkiu estis eniginta la manon en min, estis elŝirinta la pulmojn kaj se la degraditaj dentoj en la mallumo de la jardekoj mi anstataŭis per protezo, la nuntempa foriĝo de la filino

mi povis anstataŭ per nenio, tio suferigis min idiotece: ĉiuj diradis min ke mi devus esti feliĉa, mia filino estis bonŝanca, ŝi estis eskapinta la senfinan mizerecon de Albanio, povus konsideriĝi elektiton de Dio. Mi komprenis tion, pli ĝuste mi klopodis kompreni. Kaj mi ne sciis ke post la filino la sama ŝanco ekridus al mia filo, tre rara kazo ĉi tiu, ankaŭ lin Dio helpis foriĝi el Albanio, ekiri ankaŭ li al Usono kiel ekonomian elmigrinton, kaj tio okazis ĝuste semajnon antaŭ ol mi enaviadiliĝu al Curiho kaj de Curiho al Lisbono. Ampleksita de perdititeco, mi apenaŭ kapablis konsciiĝi. Tia malkoncentriĝo igis min entrepreni la aventuron de la Trajno ne pretigitan. K vazaŭ ŝiritan folion, kiun forprenas la riverfluo kaj kondukas ien ajn ĝi volas. Min ĝi kondukis al Al Paĉino kaj Kavabata.

Ankoraŭ ion por konkludi ĉi tiun unuan parentezon. Mian staton malekvilibritan stampigis cirkonstanco al kiu mi montriĝis nekapabla: nescio de la Angla. La tedo pro sentiĝo ofte eksterlude pro ĉi tiu difekto en mia formiĝo iama, nun malfacile korektebla, komenciĝis por mi ekde en Lisbono, dum la oficiala akcepto kie oni tradukis nur angle, germane kaj ruse, kaj daŭris ĝisfine, en Berlino. En ĉi tiu punkto mi devas malfermi la duan parentezon. Ankaŭ tio ne rilatas al la Trajno. Estas denove io propra kaj povas sonori tiel nekonvene kiel la epizodo de la eligo de la dentoj, la elmigro de ambaŭ infanoj kaj miaj oftaj nervozaj statoj pro nescio de la lingvo de Ŝekspiro. Mi ne povas ekspliki kial post la akcepto en Lisbono, reveninte en hotelo kaj fermiĝinte en la ĉambro, post kiam mi estis aŭskultinta la tradukojn en la rusa por kompreni kelkion, mi ekreitis subite en la rusa. Estis io stranga. Mi recitis Lermontovon, poezion de Puŝkino, forgesitajn strofetojn el la fabloj de Krilovo kaj ampleksiĝis de stato preskaŭ malsana. La rusa lingvo ĉe mi estis delonge entombigita, kelkajn jardekojn antaŭe. Mi ne kredus ke, post tiom da jardekoj, plurestus io kaj tiu io flosu el la profundecoj kaj eliru surfacen ĉi tie, en Lisbono. Kaj, dum kiam mi rigardis konfuzita la sensualan ĉielon de Lisbono, mi pensis ke finfine, tio okazanta ĉe mi, ne estis tiom ne atendata. La rusa civilizo estis unu el la unuaj fontoj de mia formiĝo, altrudita de la prizorgantoj de miaj adoleskanteco kaj juneco. Estis tiam la epoko de la floriĝo de la

amikeco de la tiel nomata Orienta Socialisma Tendaro antagonisme al la Kapitalisma Tendaro Okcidenta. Unuflanke NATO-o, aliflanke Traktato de Varsovio, meze la Muro de Berlino. Kaj mi, produkto de la epoko, kun la ties neforviŝebla stampo.

Ĉi tiu epoko fermiĝas per paradokso eble plej stranga de mia vivo. Ĝi rilatas al tio kion mi nomas mian eŭropecan konsciigon kaj ĉi tiu konsciigo okazis en Ĉinio. Dum la tempo kiam mi legis ruse Ĉehovon kaj min ŝajnis natura daŭrigi la studojn en Moskvo, miaj prizorgantoj ŝanĝis la direkton, por mi oni elektis Pekinon. Kun Pekino, la plej magian sciencon, matematikon. Tio koincidas al la mia unua neniiga malkovro: mi ne havis talenton pri matematiko. Estis la komenciĝo de la jaroj 60. Sur la influoj de la rusa civilizo je akcentitaj kolorigoj sovetiaj, ene de mi ektavoliĝis elementoj de la ĉina civilizo. La lingvo, la vivmaniero, mondo tiel nekomprenebla je aspekto kiel la simboloj de la Opero de Pekino, envolvis min per la reto de kompleta konfuzo. La ĉina civilizo sin prezentis fermita: Granda Muro disigis min de ĝi, la hieroglifoj. Tamen, malgraŭ la baro de hieroglifoj, la ĉina civilizo elmontriĝis por mi tuŝebla. Envere mi ne kapablis studi Konfucion, la taoismajn doktrinojn aŭ budismon, sed mi kapablis amori kun ĉinaj knabinoj! Nenio proksimigas vin pli multe al iu civilizo, ne elmontras pli kompreneblan nekonatan mondon, ol la virino. Mi malkovris tion en Ĉinio, kie eŭropano, kaj tie mi estis eŭropano kiel ĉiuj aliaj, pro mil kialoj pri kiuj ne valoras plilongigi ĉi tie, ne malfacile amorus kun ĉinaj knabinoj. Kaj tiel, konsciiginte unue en Ĉinio rilate mian eŭropecan apartenecon, mi alvenas en la trian parentezon, kun du lastaj paradoksoj.

Tiun vesperon en Lisbono, sojle de la vojaĝo, kontemplantе la turbuligan ĉielon de Portugalio, mi sukcesis formuli en la cerbo ion, kion mi sciis delonge, sed tiunokte ŝajnis al mi kvazaŭ rivelon: mi estis restinta produkton ne realigitan de la epoko.. Iam, pro politika kaj ideologia rompiĝo kun sovetianoj, la irado de mia vivo ĉesis, ricevis alian direkton. Poste, pro politika kaj ideologia rompiĝo, ĉifoje kun ĉinoj, la irado de mia vivo denove ĉesis, mi revenis patrien ne finstudinte, ne konkludinte ion, kun du fremdlingvoj kiujn mi ne bezonis en la vivo, definitive konvinkita ke matematiko

ne estis por mi. Tio koincidas al la kompleta memizoliĝo de Albanio, transformiĝo en geto-on de eta lando, forgesita de la mondo, forlasita en sia sorto, ĉe rando de Balkanio. Eŭropo troviĝis tie, tutapude,, sed, je paradokso, ĝi estis malproksima galaktiko, ne atingebla. Mi nun troviĝis ene de malluma tunelo, mi moviĝis ne sciante kien iris, sen iu ajn lumbrileto. En ĉi tiuj kondiĉoj, la sola libera spaco kie mi fuĝis en soleco fariĝis la lingvo de Moliero. En la mezlernejo, krom la rusa kiu estis deviga, ni povis elekti kiel duan fakultativan fremdlingvon unu el tri grandaj okcidentaj lingvoj: angla, germana aŭ franca. Laŭ la konsilo de mia patro, mi elektis la francan. Mi estas dankema pro la konsilo kaj, ĉikaze, mi preĝas ke lia animo (li estis artisto, estis studinta pri violono dum sep jaroj en la Konservatorio de Pavia, en Italio) ripozu enpace tie kie li troviĝas. Kun mia patro rilatas ankaŭ la lasta paradokso. Kiam mi demandis iufoje dum lia vivokrepusko kial li fariĝis komunisto, li ne serpentis, respondis ke dum la jaroj en Italio tio estis la plej bona solvo. "Antaŭ mi, rediris li, stariĝis du alternativoj, ĉu mi ĉirkaŭpreni la komunismon de Antonio Gramŝi aŭ la faŝismon de Duĉe..." Mi ne volas juĝi mian patron, sed certe, krom la faŝismo de Duĉe kaj komunismo de Gramŝi, en la patrio de Verdi ekzistis ankaŭ aliaj alternativoj. En la vivokrepusko, kiam li finiĝis tragike, kondamnita kaj forĵetita kvazaŭ vringitan citronon far sia partio, li pasigis la tempon ludante per piano fugojn de Bah, ĝis kiam li mortis forlasita ankaŭ de plej intimaj amikoj. Tio okazis kiam mi, post kiam mi estis forlasinta matematikon por min okupi per beletro, mi komprenis ke mi estis farinta la plej eble danĝeran eraron de la vivo. Danke al la lingvo de Moliero, mi havis la eblecon kontaktiĝi kun la grandaj aŭtoroj de XX jarcento kaj mi komencis pli malpli ekkompreni kio ja estas la vera beletro. Kaj fari veran beletron en lando kiel Albanio, kie oni senkapigis eĉ la plej senkulpan disidentulon, estis malbenita afero. Sed ĉi tio estas enua ĉapitro, kun konataj kozoĵ, senvalororigitaj post la falo de la Muro de Berlino. Des pli, neniuj postsekvus min en la malluma tunelo de tiuj longaj jardekoj, kiam laŭgrade miaj dentoj degradiĝis, parto el ili forfalis antaŭtempe, la ceterajn mi eligis laste, anstataŭis per protezoj, tiel, ankaŭ kiam mi emas ekplori, mi povas ridi kion mi volas, ne

timante ke mi aspektos terure malbela, kiel mi aspektis antaŭ ol apliki protezojn.

2

Nun, post ĉi tiuj paradoksaj parentezoj, estas la okazo eniri en la temo, rakonti kiel kaj en kiaj cirkonstancoj, dum la Trajno fendis la spacojn de Eŭropo, dum mi iris al la renkonto kun Al Paĉino kaj Kavabata. Pro nekredebla blokiĝo de la cerbo, mia intelekta kapableco estis en la nivelo nul: mi ne kapablis fari ion ajn, nek legi, nek skribi, mi ne havis deziron, nek nervojn, por elteni la konversaciojn kun kolegoj. Kontraŭe, mi komencis sin dediĉi diligente al la ĉiutagaĵoj. Mi estis ekveturinta kun du tekoj je averaĝa grandeco, kiuj en Parizo fariĝis tri, mi devus aĉeti unu novan, relative grandan, por la materialoj de la Trajno, kies dosiero ŝveliĝis de urbo al urbo kaj mi bedaŭris liberiĝi disde ili, mi volas diri forĵeti en la rubaĵujon. Poste, iel ajn, estis la donacoj. Plue la ĉemizoj kaj novaj blankiĝaĵoj, ol lavi la uzitajn en la hoteloj kontraŭ prezo notinde pli alta. La pretigo kaj malpretigo de la bagaĝoj, en la plejmulte de kazoj haste lastmomente, la prizorgo por ligi en la tekomanilo la kartonon je konvena koloro de la postsekva hotelo, akirigis min plezuron. Mi ne bezonis cerbumi pri io ajn, la aliaj pensis pri mi ĝis la plej etaj detaloj, ĉio estis antaŭvidita, planita kaj pli poste, en la kajuto, mi ekdormus pli kvieta por plenumi eĉ malmulte la sendormecon aŭ kontempli la pejzaĝon de Eŭropo kaj, en iu kazo, plonĝi en spekulacioj preskaŭ filozofiaj.

Ĝuste en unu el ĉi tiuj kazoj, mi diras je dolĉa pigreco, mi enfalis en kaptilo. Estis tio neatendita kaj mi ne povis eskapi ĝin. Dum la Trajno ŝanceliĝis kun la sendormeca bruo, en la kajuto kie mi restis eniris la portugalingo Igenes Pedrosa. En la mano li tenis notlibron. Per sia anĝeleca rideto ŝi demandis de mi noti en ŝia notlibro la epitafon kiun mi pensis ke oni skribus sur.. la plato de mia tombo! Komence mi ne komprenis kion demandis de mi kaj Igenes, kun helaj okuloj, senkulpa kiel la okuloj de infano, eksplikis ankoraŭfoje ke ŝi demandis ĝuste tion, la epitafon kiun mi pensis ke oni skribus sur la plato de mia tombo...Mi restis konfuzita, tio estas ja la plej neatendita demando, neniam okazis ke mi cerbumu pri tio. Mi

ŝultrolevis, diris al Ignes ke mi bezonus pripensi kaj ŝi ridis, kaj elirante el la kajuto, fingrominacis min: " Vi devas nepre trovi vian epitaŝon. Mi neniam deŝiriĝos disde vi!"

Mi ne memoras en kiu vojaĝpunkto ni troviĝis, plejverŝajne ni troviĝis ankoraŭ Okcidente, mi volas diri en la nuna Unuiĝinta Eŭropo la Trajno antaŭen elanis, ĉiam tra la senfinaj kampoj kaj arbaroj je direkto al la alia Eŭropo kaj mi, restinta en la demandkaptulo de Ignes, ekcerbumadis, envere, kiu do estus la epitafo kiun oni skribus sur la plato de mia tombo? Tio estis la unua turniĝmomento de la vojaĝo, kiam mia spirita stato ŝanĝiĝis. Eble la demando de Ignes tute ne rilatas al tio. La vera kaŭzo eble estis la transpaso de unu Eŭropo al la alia. Mi ne sentiĝis kvietaj, io sufokigis min, rememorigis min la vivokrepuskon de mia patro, kiam li pianludis fugojn de Bah, kaj tio komenciĝis en Kaliningrad, kun la konfuzo pro sonoj de balalajkoj kaj magia beleco de la rusaj knabinoj, pro griza pejzaĝo kun peza morneco de la urbo, la impresiga ĉeesto de la militistoj kaj festaj solenaĵoj rememorigantaj ion tre konatan, kaj ĉiuj ĉi tiuj turnigis min en obsesion la deziron por trovi la epitaŝon kiu povus skribiĝi sur la plato de mia tombo. Kontraŭ al la kategoria rekomendo de la kuracisto, kontraŭ ankaŭ al la reĝimo preskaŭ de monaĥo de mia vivo en Albanio, mi pliiĝis la alkoholaĵajn porciojn. Komence tiujn de la ruĝa vino. Poste, de vodko. En Sankta Petersburgo mi aĉetis du botelojn tri kvaronlitrajn Smirnoff, kiujn mi finis la lastan nokton, en Berlino.

Nun mi pensas ke, je unu vidpunkto, la Trajno estis ia eksperimento. La partoprenantoj sin montris originalaj per la manieroj de ilia reago, en la apartaj kondiĉoj de ĉi tiu eksperimento, kie kvazaŭ laboratorion, servis la spaco de Eŭropo. En mia kazo, nekompreneble, mi ekkondutis kiel adoleskanto delasita disde la katenoj, forgesante ke en miaj makzeloj ne plu estis dentoj, estis nur protezoj, kaj tiel kiel Zorba de la greko Nikos Kazanaki, mi ekpensis ke mordu, eĉ per protezoj, ne estas pekaĵo. Tiel mi alvenas en tiu norda vespero en Riga, kiam en mia cerbo unuafoje Eŭropon mi imagis je formo de virino, pli ĝuste de bela knabino kvazaŭ en sonĝo, sed tio maleblas.

Ni estis revenante en Rigan per turisma ŝipo, post vizito ie, en landlimpunkto de la eksa Sovetunio, plenigita je bunkroj. Tiel, kiel en la aliro ankaŭ en la reveno, mi okupis lokon en la interna parto de la ŝipo, sur seĝo apud la orkestro. Ŝi troviĝis transe, kontraŭ min. Ne eblis malokulfrapi, mi rimarkis eĉ dum la vizito en la plaĝo-muzeo kun bunkroj, je akompano de virino kaj alia knabino pli juna. Kun la vinoglaso enmane, dum la knaboj de la orkestro eniris en la ludon, mi apenaŭ povus malĵeti la okulojn al ŝi, kun ia baro en la enspirado. Tiu baro okazas eĉ mi antaŭ la skuantaj belecoj ekzistantaj sendepende de mia estaĵo, nenion rilatas al vi, estas tie, kiel ateston de la fakto ke en tiu ĉi mondo ne ekzistas pli mirinda kozo ol bela virino. Malmulte da minutoj pli poste mi troviĝis fronte de la knabino, meze de grupo de gejunuloj dancantaj. Ni sukcesis interkomunikiĝi en la rusa, ĉar mi ne scipovis la anglan, dum ŝi ne scipovis la francan. Ŝi diris ke studis aŭ finstudis en fako pri la internaciaj rilatoj, kion mi ne komprenis kio estis. Kaj en sia lingvo ŝi prononcis sian nomon. Ŝajnis ke ŝi diris Lidia.

Ŝi estis altstatura, pli alta ol mi, kun blanka vizaĝo, ĉirkaŭita de nigra hararo, kun nigra bluzo, pantalonoj same nigraj, kun kelkaj kvietaj okuloj, profundaj. Baldaŭ ŝiaj vangoj ruĝiĝis. Ŝi deziris ke ni dancu. Neerarebla senso de maljuna lupo komprenigis min ke ŝi konsideris min partneron kaj mi vekigis kaj diris al si: "je Dio, mi ne estas ĉi tie por trovi la epitaŝon de mia tombo, mia misio estas ja alia, la malkovro de Eŭropo kaj sendube, Dio estas transforminta Eŭropon en la formon de ĉi tiu mirinda estaĵo, estas donacinta ĝin". Ekde tiu momento mi forgesis la protezojn, min sentis studenton, en la kulmino de la forto kaj Lidia komprenis tion, la efikon kiun estis ekzercanta al mi kaj eksaltadis, kantadis, kriadis, skuadis la kapon freneze, kun la kapo la hararon, sub la eksploda ritmo de la orkestro kaj tio plezurigis min, karesis mian masklan orgojlon, igis min eligi facile la tutan talenton de la eksa stulta dancisto, en la medioj de la fremdaj studentoj de Pekino, kie mi escelentis. Tio daŭris pli ol horon, tiom kiom daŭris la navigado ĝis Riga.

Antaŭ ol ni alvenu, la orkestro ŝanĝis la ritmon, kaptis bluz-on. Mi restis sensciante kion fari, meze de bluaj, ruĝaj kaj verdaj lumoj kaj, kun nova baro en la enspirado, mi rimarkis ke Lidia estis staranta,

apud mi, dum la plejparto de la dancantoj eksidis. Je Dio, ŝi ridis, ŝi ŝatis ke ni daŭre dancadu. Mi surmetis la manojn ĉirkaŭ ŝia zono, proksimigis ŝin ĉe min kaj ŝi pendis ĉe mi, ĉirkaŭvolvis min per ambaŭ brakoj, apogis la vangon sur la mian kaj mi pleniĝis per ŝia aromo. Mi estis varma, atakis min la ŝvitoj, sed mi ne aŭdacis moviĝi, mi ektimis, ke se mi enigus mian manon en la poŝon por eligi de tie naztukon por forviŝi la ŝvitojn, tiu magia momento rompiĝus. Mi fermis la okulojn. Kaj sub la konfuziga melodio de la bluz-o subite aperis antaŭ mi Al Paĉino en filmo kies titolon mi ne rememoris, en la rolo de blinda kolonelo, en la sceno de la dancado kun nekonata fraŭlino. Mi sentiĝis kvazaŭ la blinda kolonelo de Al Paĉino. Mi dankis Dion kiu estigis por mi tiun subliman momenton, kiam tenis inter la manoj Eŭropon en la formojn de letona knabino, por kiu mi sciis nur la nomon. Sed mi tuj komprenis ke la memsentiĝo kiel la blinda kolonelo en pensio estis io fatala por mi. Komence, ĉe mia cerbo kapricis susuri en la orelon de Lidia, ke, ĵus alvenonte en Riga, ni pluen daŭrigu, iru ien, en iun muzikamuzejon, restoracion, kien ŝi volus. Sed Al Paĉino kaptis min en la gorĝo. "La knabino ne apartenas al vi, diris li. Ĝis nun ŝi donacis vin ĉion, malavare, sed pluen, idioto, ŝi ne apartenas. Iĝu racia, kaj se vi frenezigiĝis, revenu en la hotelon, serĉu prostituinon, kundormu kun ŝi kiel mi dormis en la filmo, sed ne detruu per viaj propraj manoj la memoron de ĉi tiu magia momento."

Alveninte en Riga, mi kaj Lidia estis la sola paro daŭriganta la dancadon. Poste ankaŭ la orkestro eksilentis. Ni restis kelkajn momentojn senmove, unu kontraŭ la alia. Dum la vojaĝantoj elŝipiĝis, mi faris la lastan geston, proksimigis Lidian al mi. Dankis ŝin kaj kisis en ambaŭ vangoj. Ŝi restis rigidigita. Mi ne scias kial Lidia restis rigidigita, je aspekto de homo kiu nur ĉi tiun finon ne ekspektis. Al Paĉino eksplikis al mi ke, laŭ la norda kutimo, mi devus kisi ŝin trifoje kaj ne dufoje. Mi eligis mallaŭdon. Amikece. Kaj revenis en la hotelo. Tie mi ricevis botelon da vino, ekdrinkis sola en la ĉambro, malrapide. Je la mateno, fintrinkinte la botelon, baro okupis mian gorĝon. Mi ne kapablis demeti la rigidigan rigardon de Lidia.

Tio estis la dua turnomomento de la vojaĝo, ege grava. Ĉar pro la aŭtomata ripetado de la ĉiutagaj agoj, la eksterordinara kaj neripetbla flanko de ĉi tiu vojaĝo estis turniĝanta en rutinaĵon, estis akiriganta laŭgrade sentecon similan al tio spertata kiam vi troviĝas ene de muzeo plenigita per ĉefverkoj, kiun vi devas rapide viziti kaj sentiĝas laca, nepotenca, nekapabla por absorbi pretere la frakasigan majestecon de la ĉefverkoj. Tiun sojlon mi transpasis en Riga, post la renkontiĝo kun Al Paĉino, ne pripensante ke min atendus alia renkontiĝo, same intensa, ĉifoje kun Kavabata.

Ni ŝoviĝis ĉiam pli al la nordo, al Talin. Ekde tie ankoraŭ pli norden, kun forta deviigo orienten, al Sankta Peterburgo. Plue ĉio ekruliĝus rapide, kiel malsupreniras je la sudoriento la vojo al Moskvo kaj de Moskvo enfalas je sudokcidento al Minsko. Sankta Peterburgo aperis antaŭ mi kvazaŭ pezmiena sinjoro, vestite per frako malnoviĝinta pro la tempo, restinta forlasita ĉe vojrande. Sed tiu sinjoro altrudiĝis per aristokrateca fiereco, per revenigita digneco, ĉar estis reakirinta sian veran nomon, kiel reakiras legitima reĝo la kronon, kvankam la ĉeesto de la falsa uzurpinto sentiĝis ĉie krianta, sufiĉa por revenigi vin en la realon de la kozoj. Poste la malbela vetero kaj la pluvo neniam disiĝis de ni. Nur en Nevski Prospekt mi sukcesis rekonstrui mian imaĝon pri Eŭropo kaj tio rilatis al la beleco de la rusinoj. Ĉi tiun specon de la imaĝo, en malsama konteksto, mi konfesis ankaŭ al kelkiu alia. temas pri la irlandanino Anne Haverty.

Ni estis en Moskvo, drinkis bieron en lokalo apud la hotelo kaj mi konfesis al Ana ke por mi la beletro similis al bela virino, post kiu mi iradis tutan vivon, ne sukcesinte posedi. Ŝi ridis, ne ricevis serioze miajn diraĵojn kaj tio plaĉis al mi, samkiel terure plaĉis la maniero per kiu ŝi parolis la francan je irlanda akcento. en ĉi tiu punkto mi dezirus plilongiĝi, sed nun malfeliĉe, mi devas trovi la vojon plej mallongan por iri al la fino de la skribaĵo kaj tio, restanta por rakonti, estas tre virtuala.

Do, ni drinkis kun Ana po bierglason en lokalo apud la hotelo en Moskvo kaj morgaŭon ni troviĝis ambaŭ meze de eta grupo de verkistoj bonŝanculoj por veturi al Jasna Poliana. Estis bela tago, kvankam dum la vizito en la Domo Muzeo de Tolstoj, mi estis

denove devigita disiĝi disde la grupo, mi estis la sola kiu ne komprenis la anglan, do estis devigita postsekvi la rusparolantan gvidiston. Ana akceptis fotiĝi kun mi ĉe la Tombo de Tolstoj, teramaso meze de la arbaro, je formo de verda paralelopipedo, neniu noto, neniu plato, nenio kaj en la momento kiam mi eksentis la fotifulumeton, pripensis pri la epitafo sur mia tombo. "Mi ne estas Tolstoj, pensis, li ne bezonas epitaŝon, dum mi estas mortebulo kaj, je Dio, mi bezonus epitaŝon, sed kiu estus la plej taŭga epitafo sur la mia tombo?"

Ĝis ĉi tie, ĉio estas vera, kiel estas tia ke, je elirejo de Jasnaja Poliana, Ana kaj Corinne Desarzens, svisino, aĉetis de kelkaj studentinoj akvarelojn, kiel estas vera same ke niaj gastigantoj, ege afablaj, donacis neforgeseblan tagmanĝon iom pli fore, meze de betula arbaro, kie ni manĝis kaj drinkis, mi precipe vodkon. Mia intrigo komenciĝas post la reveno de Jasnaja Poliana, en la oficiala solenaĵo aranĝita por ni de la urbodomaj aŭtoritatoj de Moskvo, en la 21-a etaĝo de la hotelo.

Post kiam mi duŝis, enlitiĝis por rekapablighi. Kuŝante, miaj okuloj direktiĝis al la plafono, mi emis ekridi, sed ankaŭ iom hontis, mi tro drinkis, dum la tuta vojo mi estis parolinte senĉese, estis imitinta la francan je irlanda akcento de Ana kaj kiu scias kiajn aliajn stultaĵojn mi estis farinta. Mi volis dormi, sed, se mi ellasus min, riskus ne partopreni la solenaĵon. Poste venis momento kiam mi faris la lastan klopodon por ne enmaniĝi al la dormo kaj malfermis la okulojn. Sed eble mi malfermis la okuloj pro io alia. La korpon mi sentis adstringitan, ankaŭ unu brakon. Mi rimarkis ke daŭre mi troviĝis sur la lito, ĉifoje senvestita. Poste, Dio mia, mi ne estis sola, apud mi troviĝis kuŝanta knabino. Kapturnante pene mi vidis nur la ties duonon de la vizaĝo, kovrita per kelkaj flavaj haroj. Ŝi dormis kun la kapo sur mia brako, tio estis la kialo ke mi sentis ĝin adstringitan, sed mi ne aŭdacis moviĝi. Se mi moviĝus, ĉio finiĝus, ŝi malaperus kaj mi emis kredi freneze ke mi ne sonĝis. Laste, la knabino moviĝis mem, mi sukcesis liberigi la brakon, restis senspire, ĝiskiam mi kuraĝis kaj leviĝis surkubute.

Ŝi daŭre dormis. Estis laktokolora kaj kun la fermitaj okuloj ŝi aspektis kvazaŭ paradiza anĝelo. Mi denove ekkuŝis apud ŝi. Mi

diris al mi ke, nepre, mi travivis scenojn el miaj iamaj legaĵoj, en la mallumo de la tunelo kaj ŝajnis mia memo kvazaŭ tiuj impotentaj maljunuloj de Kavabata en la romano "La domo de la dormantaj belulinoj", epizodo menciita en iu skribaĵo de Gabriel Garcia Marques. Mi ekcerbumadis por trovi la titolon de tiu skribaĵo. Poste mi metis min en la rolo de la maljunuloj de Kavabata kaj kuŝanta apud mia dormanta belulino, same kiel ili, mi klopodis rememori ion belan el mia vivo, sed tio estis malebla. Mi rememoris ke la skribaĵo envorte de Marques titoliĝis "La dormanta belulino de la aviadilo". Rilatis ĝi al la japanaj verkistoj pri kiuj la majstro komence sciis nur ke la plejparto el ili estis sinmortigintaj per harakiri. Pli poste, leginte, mi komprenis kial kelkiuj insistis eldiri ke lia maniero de la verkado similis al la maniero de verkado de la japanaj verkistoj.

Intertempe, la knabino malfermis la okulojn. Kelkaj grandaj okuloj, blukoloraj, kvazaŭ du oceanaj gutetoj. Ŝi ekridis. Tristece. Mi faris lastan klopodon por rememori kio okazis post la reveno el Jasnaja Poliana, sed nenion rememoris. Ĉar ni ambaŭ troviĝis senvestitaj, tio signifas ke ni kundormis tutan nokton kaj nun, apud ŝia varma korpo, mi sentiĝis kiel la impotentaj maljunuloj de Kavabata. Mi dankis al Dio. Li estis donacante denove Eŭropon en la formoj de ĉi tiu trista sorĉa knabino, kies nomon mi eĉ ne sciis. "Vi povas nomi min Natali, ŝi eksplikis, kiel vi alvokis min lastan vesperon, en la Ruĝa Placo, kie mi estis ekde jarcento atendante vin, apud la Katedralo de Sankta Bazilio, kaj vi, ĵus vidinte min, ekkonis min kaj alvokis per la nomo Natali, kvankam mia vera nomo ne estas Natali. Sed tio havas nenian gravecon. Grava estas ke laste ni renkontiĝis." En ŝiaj diraĵoj estis nur unu vero. Ĵus ni troviĝis unuafoje en Ruĝa Placo, apud Kremlo, nekompreneble kiel, mi ekkaptis mallaŭte la melodion de la kanzono de la franco Gilbert Becaud, dediĉita al la moskvanino Natali. Sed tio estis okazinta du jarojn antaŭe kaj ne hieraŭan vesperon, kaj apud la Katedralo de Sankta Bazilio mi estis vidinta neniun knabinon, kvankam ankaŭ mi estis revinta ekde prehistoriaj tempoj, kiam mi legis en la rusa Ĉehovon. Poste mi rezignis ekscii kio estis okazinta, difini ĉu mi troviĝis en la realo de ĉi tiu mondo aŭ en virtuala mondo. Mi enmaniĝis al Natali. Estis tio

la sola realo ekzistanta por mi. Nesciante ke tiamanire mi estis irante al la fino, en songântan koŝmaron.

Finfine ŝi leviĝis, sin vestis: pantalonojn blukolorajn, premitaj al la korpo, maldikan ĉielkoloran bluzon, per kiu ŝi kovris la mamojn. Ŝiaj mamoj ne bezonis teniĝi per mamzonoj. Ŝi surmetis en la kapon ŝian ĉapelon blankan kaj okulumis al mi. Glaciiginta, mi pensis ke ŝi nun foriĝus. Ŝi ne foriĝis. Ŝi diris ke sentis malsaton. Ni kuniris en la bufedejon de la etaĝo, kie por estingi la malsaton, ŝi manĝis kelkajn ĉerizojn. Kaj trinkis teon. Trinketante la teon, sidante sur la apuda seĝo, aperis antaŭ mi denove Al Paĉino. "Sinjoro, diris li, vi havas okulojn kaj estus bone malfermi ilin!"

La vero estas ke mi sentiĝis ampleksita de neeksplikebla inkubo, sed ne komprenis la signifon de tiu averto. Tiun momenton, Natali kaptis min per la mano, ni troviĝis en la Ruĝa Placo, je flanko de Kremlo. En ŝiaj okuloj mi rimarkis larmeron. "Dio mia, murmuris ŝi, ekde jarcento mi atendis vin, dum vi vagadis tra la mondo."

Tiam okazis la miraklo, mi malfermis la okulojn. Je Dio, mi estis juna, dudekjara, tiom kiom Natali. Mi forprenis ŝin per miaj brakoj, levis ŝin alten, ekĉirkaŭiris kun ŝi. La miraklo de mia transformiĝo al dudekjarulo, certe estis verko de diina animo kiu flirtis en la ĉielo de Eŭropo en la formoj de Natali, eniĝis en min, tamen dependis de mi liberiĝi de inkubo, eble ĉar ŝiaj okuloj tutan tempon estis tristaj. Ni kuradis laŭlonge de Ruĝa Placo. eliris en alian flankon kie stariĝis la monumento de Ĵukov surĉevale, faris fotojn per mia fotilo, multajn fotojn, drinkis bieron. Poste ĉio subite ekruliĝis. Mi daŭre luliĝis en la eŭforio de la miraklo, kiam neatendite ni troviĝis en la enirejo de la hotelo. Mi ne komprenas kial kaj kiel ni troviĝis en la enirejo de la hotelo. Eble ĉar tiun vesperon mi forlasus Moskvon. Eble ĉar Natali sentiĝis laca. Kaj tiel venas la lasta sceno. Dum ni eniris en la hotelon, tri civiluloj elprenis Natali-n kaj perdiĝis malantaŭ pezan pordon. "Mi avertis vin, susuras Al Paĉino, vi devus gardi vin de tiuj kanajloj." Kaj malaperas. Mi restas sola antaŭ la peza pordo. Mi ekfrapas. kelkiu, vizaĝo rememoriganta min iun konatan, eligas la kapon, rigardas min malestime. Kaj kunbatas la pordon al mia vizaĝaĉo. Mi ekfrapas denove, forte, ĉiam pli forte. La sama vizaĝo rememoriganta iun konatan, aperas denove, kaj ree

ĵetrigardas malestime. Tiam mi rememoras, lia vizaĝo similas al la portreto de Stalin. Kiam mi eldiras tion, li ridegaĉas. "Mi estas mem Stalin, diras, mi estas viva..."

Mi staris apud la pordo kiu fermiĝis kaj ne plu malfermiĝis. La tempioj miaj bruegis, dume ene, ie, sonoritis senĉese telefontintilo. Mi havis la impreson kvazaŭ fendigis la orelmembranojn kaj per superhoma klopodado mi alvenis en la realon de la kozoj. La realo estis la jeno: mi troviĝis en la hotelo Belarus, en Minsko, unu nokton antaŭe mi estis drinkinta vodkon dum oficiala akcepto kaj miaj kolegoj estis sciiganta per telefono ke mi devus baldaŭ malsupreniri, kun la bagaĝoj, post dek- dekkvin minutoj ni ekirus al la stacidomo je direkto al Varsovio.

Mi ne povas ekspliki kial la moskvan sonĝon mi vidis en Minsko. Mi pretis kredi ke mia priplorinda spirita stato ne venis pro la danĝeraj malbonuzoj per alkoholo, sed rilatis al knabino, ŝi nomiĝis Natali kaj nun kiu scias kie ŝi troviĝis, kaj mi suferis pro peza sento de kulpulo. La tutan vojon mi trairis silenta, ampleksita de idioteco. Ĵus alveninte en Varsovio, mi faris la lastan teston de mi mem. Mi iris al fotolaboratorio, disvolvis ĉiujn filmojn, eĉ tiun troviĝinta ankoraŭ en la fotilo. Mi trovis Natali-n nenie, en nenio pozo. Do, ĉio estis cerba produktaĵo, je serĉado de simbolo. Mia imago de Eŭropo rezultiĝis erara. Se ne erara, revema. "Sed la revoj, oni diris al mi, neniŭ povas haltigi. Kiel albano, ĉe kiu estas defalintaj la dentoj antaŭtempe ene de malluma tunelo, tion mi bone scias."

Kvietigita iel pro ĉi tiu rezonado, kun suspektinda dozo je optimismo, mi enrajniĝis en la lasta Trajno je direkto al Berlino. Ie, la kajuta pordo kie mi restis, malfermiĝis, en sia kvadrato aperis la anĝeleca vizaĝo de Igenes, kun la notlibro de epitafioj enmane. Mia sputo sekiĝis en la gorĝo. "Je Dio, murmuris mi, kiu estas la epitafio kiun oni skribos sur la mia tombo?"

Tirana, aŭguste 2000

Vullnet Mato



Bonata² akceptas la seksperforton

La Zervistoj³ lasis la tri kadavrojn en la ĉambro kaj eligis la novedzinon ĉe la pordon. La barbulo- oficiro, nomata Zafir, kvardekjarulo, kun la unuaj du dentoj plantitaj for unu de la alia, direktis la aŭtomatikon al la brusto de la novedzino kaj aldiris ŝin per sia filingvaĵo:

- Ĉu vi akceptas ke mi fiku vin sen krioj kaj bruoj, kvazaŭ linkon, aŭ unue mi mortigu vin kaj poste plenumu tiun aferon?...

Skuita pro la terurego de la mortigo de la edzo kaj ambaŭ ties gepatroj, ŝi ne kapablis malfermi la buŝon.

- Parolu, ĉar tutsame estos por vi, mi, kiel ajn, fikos vin, kiel tion mi faris kun la aliaj, estintaj ankoraŭ varmaj!...

Bonata haŭttremiĝis kaj rigardis time lian aŭtomatikon. Sed subite ŝi ege surpriziĝis, eĉ ne kredis al siaj okuloj. La armilo enhavis gravuritan ĉe la ties ligna pafilŝtipo, la nomon de ŝia Izet⁴, kiu estis enmaniginta ĝin en la Konsilio por pruvi al grekoj la donitan parolon, por ke ne okazu milito. Post kiam oni estis promesinta ke la kvieton certigus la armeo, neniun homon oni tuŝus eĉ "per floro".

² Virina nomo albana en Ĉamerio

³ la Sekvantoj de la greka ekstremista generalo Napoleon Zervas kiu plenumis krimojn kontraŭ la aŭtoktonan loĝantaron de Ĉamerio, nun en nordokcidenta Grekio, dum la Dua Mondmilito

⁴ Vira nomo albana

Sed ĉi tiuj estis ricevinta la armilojn enmanigitaj laŭ la donita parolo, por malfidele mortigi Ĉamojn⁵...Neatendite tiu aŭtomatiko de sia mortigita edzo, kvazaŭ poseduas la magneton de lia spirito, forviŝis ĉe ŝi la timon, mirinde, tiom kiom ŝi ne plu pensis pri sia senhontiĝo.

- Parolu, ĉar mi ne havas tempon okupiĝi kun vi, ĉu vi akceptus la bastonon mem, aŭ ne! - forte alkriis la oficiro Zafir, premante la tubon mezen de ŝiaj mamoj.

- Jes, akceptis ŝi malvarme, je okuloj ĉe la pafilŝtipo de la aŭtomatiko.

- Endaksi⁶, embros, ni iru, mi faros tion konforte malsupre en la gastoĉambro, por ke ne vidu ĉi tiujn malvivaĵojn ĉi tie supre.

Ili malsupreniris po du, dum Zafir premis la brakon de eta Bonata, altirante ŝin forte post si. Ili eniris en la gastĉambrom, kie en ambaŭ flankoj de la kamentubo estis surmetitaj kotonaj sternaĵoj. La oficiro kondukis la novedzinon ĉe la sternaĵo maldekstre, kie estis murapogitaj du broditaj kusenoj.. En la alia sternaĵo ekkaŭris, kun la aŭtomatiko meze de la piedoj, la alia Zervisto transpasinta kvindekjarojn. Dum la juna Zervisto, kun la aŭtomatiko enmane, atendis la vicon, sur granda ligna kofro, kontraŭ la pordon, post kiam estis riglinta ĝin.

- Kian zonon havas ŝi, merda albanino, je unu manĉirkaŭpreno!- ekmiris la Zervista junulo, rigardante la maldikan zonon elmontrebla ĉe la novedzino sub la blanka bluzo, supre de pufpantalonoj kaj demandis:

- Kiom jara vi estas?

- Dudek. - sin prononcis ŝi liptremante.

- De kiom da tagoj vi estas edziniĝinta?- demandis ŝin la barbulo Zafir scivoleme.

-La tagon antaŭ hieraŭ- diris ŝi per senfortigita voĉo.

- Ho, se vidus ĉi tiun gazelon nia Napoleon Zerva, ejakulis eĉ starante kaj surgrimpis ŝin tutan semajnon, ĝis kiam perdus tri kilogramojn da graso disde sia ventro!- ekridis la juna Zervisto, sidanta sur la kofro.

⁵ Albanoj loĝantaj en Ĉamerio

⁶ Enorde (greke),

- Ni kondukos ŝin donace al li, post kiam finos nian aferon mem, - rediris la oficiro Zafir. - Ankaŭ li fiku por ke ĉi tiu bela laktumulino nasku etan Napoleonon, se ne sukcesos plantigi hodiaŭ nia spermo. - Se oni demandus min, ĉi tiujn belajn Ĉaminojn ni ne devas mortigi, sed gravedigi, por ke plibeligu la grekan rason. - diris la Zervisto sidanta sur la kofro.

- Tiuj novedzinoj kaj knabinoj kiujn niaj kamaradoj enfermis en la moskeo, kun la virina grego, por ke ni fiku ilin laŭvice, envane supreniris la ŝtuparon, kie eliras la mulao por kanti kaj sin ĵetis el la minareto, hodiaŭ matene...

- Verŝajne ili volis imiti la Sulajn⁷ virinojn, kiuj sin ĵetis el la rokego dum la tempo de Paŝao⁸, - aldonis la maljuna Zervisto. Ĉi tiu novedzino estas ja saĝa ĉar ŝi akceptis la vivon, anstataŭ tiun kozon troviĝanta meze de la ties koksoj.

La oficiro Zafir, per forta mantiro deŝiris la brustobutojn de Bonata kaj eligis eksteren ŝiajn mamojn.

- Vidu, vidu, kiajn mamojn ŝi havas, kvazaŭ du granadoj en la branĉo kune kun la floraj burĝonoj...

La ceteraj Zervistoj algapis volupte.

- Eble tiu via azeno ne sukcesis deflorigi vin, pro la timo de la fusilpafoj en la vilaĝo! - demandis ŝin la oficiro Zafir.

Bonata eksilentis kvazaŭ oni enmetus ŝin en la ĉerkon.

- Parolu- alkriis Zafir. - Ĉu li rompis vin aŭ ne?

- Ne- respondis ŝi, duonvoĉe.

- Mi rompos nun vin! - diris la oficiro Zafir plezure, malkroĉinte tuj la rimenon kaj ellasis surteren la militistajn pantalonojn, dum ekvidiĝis la virilo, levinta sian ĉemizon supren.

La juna Zervisto ĉe la kofro forte ridis, ne demetante la okulojn disde la blanka brusto de la novedzino, similanta kvazaŭ du freŝajn bulojn da halvao

⁷ Sul- regiono loĝata de albanoj, nun en nordokcidenta Grekio

⁸ Temas pri albandevena osmana pasxao Ali Tepelena, reganta sudan Albanion kaj nordan Grekion dum la unuaj jardekoj de XIX jc.

- Hooo, ĉu vi, agapitemu⁹, havas kvazaŭ azenan virilon!..- ekmiris la maljuna Zervisto.

- Tiel, kiel vi, devas esti ĉiuj grekaj oficiroj, ne nur bravaj, sed ankaŭ bastonoj por la virinoj de la niaj malamikoj. Nu, rapidu, ĉar mi volas vidi kiel tion eltenos ĉi tiu freŝa bovineto, tiun heĝbastonon!

La barbulo Zafir gajiĝis, rigardante momenton sian virilon kaj aldiris, kunfrapante la langon en la spacon inter la unuaj dentoj:

- Rigardu, kiam mi surgrimpos ŝin, mi turnos la postajojn je via direkto, por ke vi vidu ankaŭ la testikulojn, ĉu estas ili enorde, aŭ unu pli malsupre, la alia pli supre.

- Tiel mia palikaris¹⁰, tiel leviĝos ankaŭ la mia, kun ĉi tiu Greta Garbo¹¹ de la filmoj.

La oficiro Zafir kun la virilo enmane, kvazaŭ pistolo direktita al Bonata, ordonis ŝin senpacience:- Rapidu, malligu la pufpantalonan streĉbendon, ĉar la ceterajn deŝiros mi!

Bonata komencis malligi la streĉbendon, dum je frakcio de sekundo, la okulvosto elglitis senvole ĉe aŭtomatiko de Izet, pendanta sur la apuda muro, kiun ŝi lernis kiel liberiĝas disde la sekurigilo kaj kiel elpafas, tagon antaŭ la enmanigo de ĝi, reveninte de Gallatai, kie estis ariĝinte ĉiuj bravuloj por defendi la vilaĝon. Ŝi tuj ellasis siajn pufajn pantalonojn ĉe la piedoj kun la novedzinaj pantofloj, kaj fulme, kiom longas la malfermo kaj fermo de la okuloj, forprenis la aŭtomatikon de la najlo. Terura pafado kaj tute neatendita de neniu el ili, eĥadis surdece en la tuta gastĉambro...

Poste dum malmulte da momentoj falis morta surdeco. Kiam la fumo de la pulvo eligita el dekoj da kartoĉoj, leviĝis al la plafono, la okuloj de Bonata sukcesis distingi la masklan seksilon de Zafir, deŝirita far la kugloj, kvazaŭ virbova intestaĵo elgutinta sangon, sur la koksojn de lia sterniĝanta korpo. Kaj iom pli transe du aliaj Zervistoj falintaj unu sur la alian, ne povinte levi je ŝia direkto la paftubojn de siaj armiloj.

⁹ Oni amu vin

¹⁰ Kamarado, knabo

¹¹ Fama sveda filmaktorino

Bonata eksentis naŭzecon pro la tuta tiu greka sango kiu estis trempinta la plankon kaj estis ŝprucinta la murojn de la Ĉama domo. Ŝi emis vomo. Ŝi ligis la pufajn pantalonojn kaj ekkuris, malfermis la kofron, kie estis kelkaj siaj vestoj kaj elprenis tie nigran longan ŝalon. Sin envolvis per ĝi kun la aŭtomatiko de Izet. Aliris la pardonon kaj subaŭskultis...Ĉirkaŭe eĥadis la armiloj en la aliaj domoj, kie rabiemaj Zervistoj estis falĉintaj senkompate virojn, virinojn neobeemajn, infanojn kaj maljunulojn, por malplenigi la vilaĝon. Ĉe rando de la heĝo estis sterniĝinta, sangumita, la granda hejma hundo, kiun ili estis mortiginta ekde la unuaj bojoj, ĵus ili estis alvenintaj.

Bonata elglitis atenteme kvazaŭ ombron en la mallumo, kreita de la tendo de la vitarbo supre de la ŝtuparo kaj eniris en la ĉambron. Izet estis falinda renverse kvazaŭ li dormus sur la sangoflako. Dum la patro kaj la patrino lia, sternitaj sur la planko el tabuloj, ankoraŭ sin tenis per premitaj manoj unu la alian, kvazaŭ ili preĝus al Dio por homa paco.

Bonata turnis Izet rekten kaj kisis lin sur la lipoj malvarmaj, susurante:

- Mia animo, ne lasis nin la vertagoj kunĝoji la vivon, sed mi venĝis por vi...- poste hastante kun larmoj en la okuloj, prenis la vatkovrilojn sur la lavotaĵujoj kaj kovris ĉiujn tri, kvazaŭ dormantajn. Malsupreniris atente la ŝtuparon, tremante pro timo, se aperus novaj Zervistoj ie apude. Transpasis la heĝon klinita tutproksime al la tero, kun la aŭtomatiko kiu malhelpis la ties iradon, ĝiskiam eniris en la kultivitan ĝardenon per maizo kaj kanoj. Pli transe ŝi malsupreniris en la torenton malheliĝinta pro la postagmeza krepusko. En la flakoj tie ĉi tie sin distingis kadavroj de vilaĝanoj senkapigitaj. La vilaĝo turniĝis la tuta en buĉejon. Ŝi eniris la solan vojon, sed kuraĝigita pro la spirita ĉeesto de ŝia Izet ĉe la ŝultro. Preterpasis tra la ĉirkaŭaĵoj apud Filat¹², Smarta¹³, Sajadha¹⁴ kaj malfrue nokte eliris en Qafebote¹⁵ de Konispolo¹⁶. Tie

¹² Urbo en Ĉamerio

¹³ Urbo en Ĉamerio

¹⁴ Urbo en Ĉamerio

ŝi aŭdis de paŝtisto, kiu gapiĝis al ŝia aŭtomatiko kaj pro ŝia kuraĝo, ke tra tiu loko estas trapasintaj tutan tagon, kelkaj centoj Ĉamoj elmigrintaj. Haltis dum momento, nur por ripozi kaj plenigi la bruston per aero de Albanio.

Ankaŭ la albana beletro parolas en Esperanto

Intervjuo en la ĵurnalo SHEKULLI (La Jarcento), 27-an de marto 2014

Luela Myftari

Esperanto. Ŝajnas kvazaŭ tio parolas pri la espero, sed fakte ĝi estas lingvo. Estas lingvo kiu havas malpli da gramatiko kaj estas pli facila por lerni. Ĝi similas la ala latina kaj ĝermanaj lingvoj el vidpunkto de vortaro. Dume, ĝia fonologio estas ricevinta la plej simplajn formojn de la slavaj lingvoj. Ĝi havas latinajn literojn kaj ne havas idiomojn kiuj plikomplikigus la lingvon. Tamen, laŭ ĉiuj ties konantoj, esperanto lingvo estas kapabla esprimi ĉiun nuancon de la homa penso. En ĉi tiu lingvo estas tradukitaj la plej grandaj verkoj de la monda beletro. Kaj el la albana beletro? Bardhyl Selimi, unu el la plej bonaj konantoj de ĉi tiu lingvo en Albanio venas hodiaŭ por intervjuo por rakonti ke ankaŭ Albanio havas jam tradukitajn verkojn en esperanto-lingvo.

Kiom da verkoj estas tradukitaj ĝis nun el la albana al esperanto-lingvo?

Estas tradukitaj jam ĉirkaŭ 20 verkoj. El tiuj estas eldonitaj antaŭ la jaro 1990 kvar verkoj (de Cuk Simoni, en la jaro 1929 “Skanderbeg-heroo de Albanio”, Kristo Frasheri “Skanderbeg”, “Poezioj” de Asdreni lak “Lirikoj” de Enkela Xhamaj). Post la jaro 1990 estas eldonitaj: Fatos Kongoli “La Hunda haŭto”, Luljeta lleshanaku “La lundo en sep tagoj”,

¹⁵ Landlimpunkto kun Albanio

¹⁶ Urbo en Albanio

Ylljet Aliĉka “La sloganoj el ŝtonoj”, Bajram karabolli “La Polino”, ka) La ceteraj verkoj atendas la eldonon ĉijare: Fatos Kongoli “La Perdinto”, Ismail Kadare “La palaco de la sonĝoj”, Adem demaçi “la Serpentoj de la sangovenĝo”, Eqrem Basha “Poeziaĵoj”, Visar Zhiti “La senfina funebra procesio”, Ylljet Aliĉka “Rakonto kun internaciuloj”, Sali Bashota “Poeziaĵoj”, Mimoza Ahmeti “Poeziaĵoj”, Ali Podrimja “Poeziaĵoj”.

Kiom malfacila estas kaj kiom da tempo bezonas la traduko de verko kia tiu de Ali Podrimja aŭ de romano “La Hunda Haŭto” de Fatos Kongoli?

La malfacilaĵoj en la tradukado el la albana al Esperanto, aŭ el ĉiu nacia lingvo al esperanto estas malpli granda ol la traduko en la alian naciajn lingvojn. Tio estas eĉ pli fidela, ĝuste pro mem la naturo de la lingvo esperanto, kiel regula lingvo kun granda flesebleco. Tio rimarkeblas aparte en la poezioj, sed ankaŭ en kelkaj verkoj kiel “la serpentpoj de la sangovenĝo” kie estas uzita lingvaĵo malvaste regiona. Menciinda ĉi tie ankaŭ la romano “la senfina funebra procesio” kie sentebblas filozofia esprimeco. Antaŭ kelkaj tagoj mi babilis kun s-ino Dorota Horodyska, tradukisto el la albana beletro al la pola. Demandinte ŝin ĉu ŝi intencis traduki la verkon de Migjeni, Dorotarespondis ke ŝi kelkfoje provis sed sensiksesse. Ĉar vi menciis la romanon “La Hunda haŭto” mi povas diri ke tio bezonis pli da tempo, ĉar la tradukaĵo transpasis en kelkajn manojn por provlegado, ĉfe ĉe bonaj konantoj d ela lingvo en la aliaj landoj. La celo estis ke ekde la unuaj niaj eldonoj ni certigu altan kvaliton.

Kiu helpas vin en la eldonado? Ĉar tio havas sian koston

Pro la nombro relative malgranda de la legantoj, ĉae temas pri minoritata lingvo ankoraŭ, ekzistas financaj malfacilaĵoj. Ĝis nun la traduko fariĝas senpage, same la redaktado kaj kompostado. Dume la eldonado estiĝas per la monhelpaĵoj de apartaj esperantistoj el la ekonomie pli evoluintaj landoj. La kvanto atingas kelkcentojn da ekzempleroj. Eble pli poste kiam la legantoj pliiĝos sian intereson pri la

albana beletro (precipe post la eldonado de la verkoj de Ismail kadare) ni povas akiri monon pro la librovendado. Eble tio efikos en la pliiĝo de la tradukaĵoj kaj la eldonado. Same ni esperas realigi balkanan projekton helpe de EU, kie preter la verkoj el la albana tradukotaj al esperanto, aldoniĝos ankaŭ verkoj plej bonaj el sep aliaj naciaj lingvoj de la Duoninsulo. Ĝis nun notindan helpon donis en la tardukado, redaktado kaj eldonado s-ro Tomasz Chmielik el Swindik (Lublin) de Pollando, universitata profesoro kaj vicprezidanto de la Bweletra Akademio de Esperanto.

Kiel atendas la albanaj verkistoj la tardukon de siaj verkoj al esperanto?

La albanaj verkistoj atendis je granda inteerso kaj bonkomprenemo la proponojn de nia asocio de esperanto por la tarduko de siaj verkoj ankaŭ al esperanto. Ili, eĉ, rezignis de la mono pagenda por la aŭtora rajto (komencante kun s-ro Fatos Kongoli ĝis s-ro Ismail kadare). Aliflanke nia asocio estas ekpluatita la popularecon kaj la subtenon de niaj verkistoj por propagandi la aespearnto lingvon ĉe albanoj

